

Emma Goldman

DU JAROJN EN RUSUJO

Dek artikoloj publikigitaj en The World



Esperantigis Jesús González

Biblioteko Mateo Morral
Ĝenerala Konfederacio de la Laboro

DU JAROJN EN RUSUJO

Dek artikoloj publikigitaj en *The Word*

Emma Goldman

Esperantigis Jesús González el la hispana eldono: *Dos años en Rusia. Diez artículos publicados en The World. Aurora Revista Quincenal*, Novjorko 1923.

Eldonita de *Pequeña Biblioteca CALAMVS SCRIPTORIVS*
Barcelono – *Palma de Mallorca*. 1978



2020 Biblioteko Mateo Morral
Ĝenerala Konfederacio de la Laboro
Urba Federacio de Viladecans'
Carrer de la Muntanya, 16
ES-08840 Viladecans

ENKONDUKO DE LA TRADUKINTO

En 1922, nelonge post ŝia foriro de Rusujo, Emma Goldman publikigis en la usona ĵurnalo *New York World* serion da ses artikoloj en kiuj ŝi denoncis la bolŝevikan teroron kaj la sufokon de la revolucio en la lando. Ĉi-jare oni ĝin publikigis en Anglujo, kiel broŝuron titolitan *The Crushing of the Russian Revolution* (La detruo de la rusa revolucio) eldonita de *Freedom Press*. Jaron poste la hispanaj anarĥiistoj de la grupo *Aurora* de Novjorko tradukis la artikolojn en la hispanan kaj ĝin publikigis kiel broŝuron.

Farante la traduklaboron, mi rimarkis, ke en la hispana teksto estis kelkaj nekoheraĵoj, nekompreneblaĵoj, nekompletaj frazoj, ktp. Pro tio mi konsultis la anglan version, klopodante por “korekti” tiujn erarajn partojn. Estis tiel, kiel mi konstatis, ke ekzistas grandaj diferencoj inter ambaŭ versioj. La k-adoj de la grupo *Aurora* dividis la tekston en dek artikoloj anstataŭ la ses originalaj de la angla (kio estas bagatelo). Sed la plej grava malsimileco estas, ke la angla versio estas pli ampleksa, pli enhavriĉa ol la hispana.

Bedaŭrinde mi malmulte regas la anglan; tial mi daŭrigis la tradukon el la hispana versio, iom pliboniganta ĝin per kelkaj fragmentoj tradukitaj (laŭ mia scio kaj ebloj) el la angla.

Mi esperas, ke iu esperantisto, bone reganta la anglan, povos kompletigi indan tradukon el la originala teksto de Emma Goldman kaj, ke ĉi tiu teksto mia povos utili al li/ŝi.

Jesús González
Januaro 2020

AL LA KAMARADOJ

Post multaj laboroj kaj penadoj ni sukcesis eldoni ĉi tiun broŝuron. Ĉar ĝi estas tiel ampleksa (ampleksa por niaj malriĉaj ekonomiaj rimedoj), estis tute neeble publikigi ĝin antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, kiel estis nia deziro, tio estas, nelonge post kiam ĝi aperis en la ĵurnalo "*The World*".

Tamen post multaj luktoj kaj malfacilaĵoj hodiaŭ ĝi aperas. Ĝi aperas tiel, kiel ni POVIS FARI ĝin, ne kiel plaĉus al ni, ke ĝi estu. Al tiuj, kiuj helpis nin, ni ankaŭ oferas ĉi tiun modestan verkon, esperante, ke ili scios ricevi kaj studi ĝin per serena spirito, ĉar estas la deziro DISKONIGI ĜIN, kio nin gvidis por ĝin traduki en la hispanan kaj ĝin eldoni en ĉi tiuj kvindek kaj kelkaj paĝoj.

La eraroj, kiujn ĝi enhavas, estas kulpo nia. Kaj se iu ne estus nia, ankaŭ kulpigu nin, ĉar la koleginino Goldman estis tro okupita, kiam ŝi ĝin skribis kaj ne povis korekti la erarojn de detalo aŭ esencajn, se ekzistas iu.

Kaj tiel, kun ĝiaj eraroj kaj virtoj, ni transdonas ĝin al la kamaradoj. Ĉiu legu kaj analizu; ĉiu studu kaj komparu. Ni niaflanke ĝin studis kaj legis kaj esperas, ke ĉi tiu laboro nia kontribuas al la komprenigo de kelkaj aferoj ene de la anarĥisma movado.

Fratece,
LA ELDONA GRUPO.

KIEL ENKONDUKO

Ĉiuj epokoj havis siajn idealojn, por kiuj oni luktis; iliaj mensogoj, pro kiuj oni pereis; kelkajn revulojn; kelkajn ekzekutistojn kaj multajn viktimojn.

Ĉi tio ĝis hodiaŭ estis la historio de la homaro, historio ripetita dum la sinsekvo de la jarcentoj, kiu ĉiam estas malnova kaj ĉiutage estas nova: historio de doloroj, esperoj kaj seniluziigoj. Granda idealo... multe da sango verŝita kaj... denove komenci.

Tiel ni venis... kaj tiel ni progresis. La socia progreso fariĝis malgraŭ ĉio, eble super ĉio. Veras, ke hodiaŭ ekzistas sklavoj samkiel antaŭ du mil jaroj; sed se ni komparas hodiaŭan sklavon kun hieraŭa sklavo, ni konstatas, ke ili estas du malsamaj sklavoj.

Kaj okazas, ke la mensogoj de la diversaj epokoj, kaj kun la mensogoj ties subtenantoj, ne povis esti sufiĉe fortaj por haltigi tiun denaskan forton, kiu loĝas en ĉiuj estuloj kaj devigas la planton disetendiĝi kaj la homon progresi kaj, kiun ni povus nomi la Pasio al la Libereco.

Misprezentante konceptojn kaj deturnante vojojn, la mensogoj de la diversaj epokoj sukcesis eviti la postulojn de la malkontentoj, prokrastante la alvenon de tio, kion oni hodiaŭ ankoraŭ deziras, kion oni ĉiam deziris. Sed kiel ni konstatas nuntempe, ilia tuta laboro faris nenion alian ol prokrasti. Sinsekve disfaligitaj ĉiuj institucioj, kiuj iam sin prezentis kiel difinitajn idealojn de la aspiro al plibonigo de la homoj kaj, kiuj momente sukcesis kovri la veron per ŝajno, hodiaŭ ni denove lokiĝas en la komenco, kun ĉiuj problemoj ne solvitaj, veras, sed kun granda sperto, kiu nin kapabligas efektiviigi kion la nescio de niaj antaŭuloj al ili malhelpis realigi.

Certaj pri tio, kion ni volas, kaj sekve sciante kion ni ne volas, ni nur bezonas konkretigi kiel efektiviĝi ĝin. Pri tio ni ankoraŭ ne akordiĝas. La suferoj de niaj avoj al ni montris per difinita klareco, ke nur pere de la libero en ĉiuj aspektoj de la vivo eblis la harmonio de la homoj kaj la progreso de la speco. Kaj tiuj samaj suferoj ankaŭ al ni montris, ke ĉi tiu libero devas esti konkerita pere de la propra strebado kaj, ke ĉiu el la homoj havas la devon atingi la plej altan gradon de perfekteco kaj diverseco. Sed tio, kion la luktoj kaj pendoj de niaj antaŭuloj ne atingis definitive konkretigi, estas kiel ĝin efektiviĝi. Hodiaŭ ne ekzistas diferenco en la celoj, kiel antaŭe; hodiaŭ jam estas nur demando pri maniero. Sed tiu maniero erarigas la mensojn, enmetas malamon en la koron, deturnas la vojojn kaj nin malhelpas atingi la tiel longe deziratan celon, la celo, kiu tiom da sango kostis al la pasintaj generacioj difini.

Ni ankaŭ konsentas, ke nur temas pri demando pri maniero, kio nin disigas, ĉiu klopodas por pravigi sian agadon, akuzante la duan malhelpi la alproksimiĝon kaj klopodante por fine atingi la celon per erara vojo.

Kiu el ni pravos? Al kiu apartenos la definitiva triumfo?

Ni ne estas profetoj nek volas trudi nian rigardon de la estonteco, kiel konkludajn bazojn. Ni sincere kredas, ke la estonteco estas plena de surprizoj eĉ por la plej exploremaj mensoj, kiuj per pli da kapablo analizas la logikan disvolviĝon de la homoj kaj la aferoj.

Tio sola, kiun ni scias, kaj ni ĝin scias per positiva certeeco, estas, ke la estonteco apartenas al tiuj, kiuj pli disiĝos de la pasinteco kaj rigardos pli for. Konsiderante, ke la hodiaŭa homo estas tute diferenca al la hieraŭa homo, ni deduktas, ke la morgaŭa homo devas esti malsama al la hodiaŭa homo kaj, ke li devas havi aliajn gustojn kaj bezonojn. El ĉi tiu vidpunkto, ni opinias, ke la estonteco devas aparteni al

tiuj, kiuj oferos pli da amplekso al la disvolviĝo de ĉi tiu nova estaĝo kaj, kiuj per pli klaraj rigardoj pri la vivo kaj la progreso pli bone scipovos adaptiĝi al la antaŭeniro de la tempoj.

La pasinteco, kaj ĉiuj rigardantaj la pasintecon, restos malantaŭe. Kaj tiuj, kiuj estis la mastroj de unu horo, ĉar ili sciis profiti de la momenta avantaĝo, kiun multfoje la sencio de la popoloj havigas, estos superitaj de tiu giganta ondo, kiun ni nomas la Pasio al la Libereco; kaj tiuj aliaj, kies idealoj estis pli grandaj ol la stulteco de iliaj epokoj kaj, kiuj iam estis katenitaj, ĉar ili estis konsideritaj frenezuloj kaj malordigantoj, havos la superan feliĉon vidi realigita kion oni konsideris neebla, gustumante la intiman kontentiĝon vidi kiel la malriĉulo ĝuas sian panon kaj la saĝulo sian frenezon.

Super kaj malgraŭ ĉio la Libereco malfermos sian propran vojon.

Elinter ĉiuj sofismoj, per kiuj la sagaco de la friponoj de la pasinteco kaj la samgradaj friponoj de la estanteco klopodis por deturni la ĉiutempajn revoluciajn fluojn, neniu pli absurda ol la sofismo de la DEMOKRATIO.

La Demokratio! Kaj kio estas la Demokratio?

La Demokratio estis kaj daŭre estas la plej absurda mensogo el ĉiuj epokoj.

La grekoj al ni parolas pri la Demokratio, kiel la plej sankta institucio, tamen ili subtenis la sklavecon; Cezaro transiris la Rubikonon en ĝia nomo; en nomo de la Demokratio, la kristanoj anatemis la paganojn kaj Napoleono detruis Eŭropon kaj restarigis la sklavecon en la Antiloj.

La plej teruraj krimoj estis kovritaj per ĝia mantelo; ĉiuj despotoj uzis ĝian nomon, kiel pretekston, kaj pro ĝia alvoko al la milito oni elverŝis la ĉiupopola sangon. Glorita pli ol ĉiuj reĝoj; diigita pli ol ĉiuj dioj, ĝi kreis diojn kaj trudis reĝojn;

neniigis imperiojn kaj ribeligis popolojn, popoloj, kiuj poste estis gregoj, gregoj, kiuj fine pereis en la buĉejo de la Demokratio.

Ĉi tiu lasta milito, la plej detrua milito, kiun la homaro memoras, estis farita en nomo de la Demokratio, kaj en ĝia nomo ankaŭ eksplodis centoj da revolucioj; kaj por plenumi la altajn celojn de la Demokratio, ŝprucis al la vivo nia tute freŝa bolŝevikismo.

La Demokratio! Kaj kio estas demokratio?

La Demokratio laŭdire estas la regado de la suverena Popolo.

Kaj ni, mirfrapitaj de tio, ke en la dudeka jarcento post tiom da travivaĵoj oni ankoraŭ intencas nin trompi per la samaj mensogoj de antaŭ tri mil jaroj, demandas: sed, ĉu eble la popolo povas regi?

Nomu la gvidanton sultano, imperiestro, reĝo, prezidanto, komisaro; ĉu pro dia rajto aŭ pro favoro de la Konstitucio, tiu reganta devas esti UNU, aŭ maksimume KELKAJ, kiuj kompletigas la ideojn de tiu UNU. La regado fare de la popolo estas nur unu vorto... La popolo, ne gravas kia popolo, neni-am povos regi per si mem, eĉ ne starigi la regulojn por la registaro, ankaŭ ne gravas kia registaro. Kaj la registaro, ne gravas kia registaro, neeviteble devas leĝigi por la popolo kaj fari per la forto, ke la popolo respektu kaj plenumu la leĝojn, kiujn la registaro trudas. Kiu ajn alia klaso de registaro ĉesus esti registaro; kaj kiu ajn alia klaso de popolo ne estus popolo, kaj sekve ne bezonus nek akceptus registaron. Dum la registaro ekzistas, kaj ne gravas kia registaro, ne povos ekzisti alia alternativo: iuj ordonantaj kaj aliaj obeantaj. Kaj dum ekzistas iu rajtanta ordoni, la vorto Demokratio estos nur vorto; tio estas: unu el la multaj sociaj mensogoj, per kiuj oni misprezentas la vojojn de la ideala celo kaj trompas la homamasojn.

Kaj ĉi tie ni finfine alvenas la celon de ĉi tiu verko: la Bolŝevikismo estas la moderna ĉampiono de la demokratio, ĝi sin nomas reprezentanto de la aspiroj de la homaro kaj asertas posedi la veran vojon por atingi la celon.

Flankasante la deviojn kaj kontraŭdirojn, kiujn la bolŝevikismo faris en Rusujo tiel, kiel ĉiujn krimojn plenumitajn, kaj limigante nin nur al la analizo de la principo, ni konstatas, ke la bolŝevikismo ne nur ne estas idealo, sed ke ĝi nekapablas efektiviĝi kiun ajn el la Ideoj, kiujn oni havas en la nuntempaj tagoj, kiel Idealojn.

La Bolŝevikismo, krom ne sufiĉis per si mem, estas kunmiksaĵo de malsamaj principoj, kiuj sin malakceptas unu al la alia kaj, kiuj neniam povos veni al konkludo. Ĉar ĝi estas tio, kion ni plej grafike povus nomi ponto, ju pli frue ĝi malaperos, des pli frue ĝi ankaŭ plenumos sian taskon. Kaj se ĝi ne malaperas, se oni sekvas la leĝojn de la naturo, kiuj pruvas, ke ĉio naskiĝinta emas konserviĝi kaj pliigi sian potencon; se, kiel estas plej logike kaj nature, ĝi formas sian propran strukturon kaj klopodas por sin trudi, proklamante sian rajton al la vivo, ne nur ĝi estas ponto, kiu kondukas nenien, sed ke ĝi estas baro, kiu malebligas la antaŭeniron de la progreso kaj estas abismo, kiu enterigos la energiojn de pluraj generacioj. Tio estas: se ĉi tio tiel okazas, kiel estas logike, ke ĝi okazos, kaj la sperto al ni pruvas, la Bolŝevikismo iĝos la plej katastrofa ĉiutempa Socia Mensogo kaj la plej ĉiujarcenta neforgesebla krimo.

Tiurilate, ĉar ankoraŭ tro fruas, ni ne povas veni al konkludoj. Povus okazi, ke la Bolŝevikismo rompus ĉiujn precedencojn de la historio; ke ĝi daŭrigus sian laŭgradan marŝon serĉante sian propran malaperon, lasante la pason libera al la vera koncepto de la libereco. Sed ĉi tio ŝajnas al ni tiel neebla, kaj ĝi tiel proksime sekvis dum sia sesjara ekzistado la metodojn adoptitajn de ĉiuj aliaj sociaj mensogoj antaŭan-

taj ĝin, ke jam estas neevitebla devo por ĉiuj progresemaj homoj sin antaŭgardi kontraŭ ĝiaj artifiko, kaj elmontri al la revolucia universala opinio la kontraŭdirojn, en kiujn ĝi falis, la falsajn paŝojn, kiujn ĝi faris, la senprecedencajn erarojn kaj krimojn plenumitajn de ĝia reĝimo de teruro, kaj la konservativajn tendencojn per kiuj ĝi ĉiutage intencas plifirmigisian potencon kaj alproksimiĝi al la kapitalisma reĝimo.

Kaj en ĉi tiu nia elmetanta verko ni devas esti tiel senkompataj, kiel postulas la cirkonstancoj. La devontigo de partio estas persona konveneco, kiu ne validas por ni.

Kiam la principoj estas en danĝero kaj oni klopodas por anstataŭigi per ŝajnigoj tion, kio tiom da laboro kaj sango kostis al ni konstrui, heziti estus perfido. Super ĉiuj momentaj konvenecoj ni devas meti niajn idealajn celojn, se ni volas fari longdaŭran verkon. La cetero estus neado de nia pasinteco kaj rezigno pri la estonteco. Ni konsideru, ke la Bolŝevika Partio prokrastis la neniigon de la ŝtato kaj de la privataj posedaĵoj ĉirkaŭ kvindek jarojn kaj, ke se ni daŭras en ĉi tiu silenta cedemo por ne doni armilojn al la universala burĝaro kontraŭ Rusujo, Rusujo kaptos la revolucian movadon, ŝanĝos ĝian vojon, ĝin uzos por siaj celoj, kaj post kiam ĝi fortiĝos per la energioj, kiujn ni al ĝi pruntedonis, ĝi uzos tiun potencon por nin ekstermi kaj malhelpi, ke nia idealo pri Ne Ŝtato detruos la bolŝevikan Ŝtaton.

El ĉi tiu vidpunkto, kaj kiel elmetanta verko, ni konsideras la artikolojn de Emma Goldman legindaj kaj komentariindaj. Eble ili ne estas kompleta verko; eble havas certajn mankojn, diras multon aŭ ne diras ĉion. Sed tiu elmeto, kiun ŝi faras pri tio okazanta en Rusujo kaj la danĝero, kiun ŝi rimarkigas, kaj la eraroj, kiujn ŝi montras, estas aferoj, kiujn ni devas multe konsideri por la estanteco kaj la estonteco.

Kaj ni devas flanklasi kion oni diris pri la persono de Emma Goldman, kaj la kvalifikaĵojn, kiujn oni donis al ŝiaj verkoj. Ni scias, ke ĉiu laboranta kaj havanta malgrandan indivecon estas kritikata, akuzata kaj kalumniata. Se ni prenas en konsidero kion oni diris, la plej bonaj kamaradoj estus spionoj, kaj tiuj, kiuj pli faris por la Anarĥismaj Ideoj, estus perfiduloj malindaj je nia estimo. Ni legu la artikolojn de Emma Goldman, analizu ĉu la faktoj, kiujn ŝi priskribas, estas veraj aŭ ne, kaj respondu per rideto de malestimo al kiuj, ĉar ili ne havas aliajn pli bonajn armilojn por sin defendi, al ni diras, ke ŝi enspezis 30.000 dolarojn pro ilia verkado. Tiuj, kiuj tion diras, estis la unuaj, kiuj nin senkreditigis, ĉar ni ne konsentis pri tio okazanta en Rusujo, kaj Emma Goldman, ankaŭ anarĥiista (kaj unu el la grandaj anarĥiistoj, laŭ ili), estis en Rusujo kaj diris nenion. La insultoj, kiujn hodiaŭ oni ĵetas sur ŝin, signifas nenion rilate kion ŝi skribis. Se ni ekanalizus la personojn, la apostolojn de la bolŝevika revolucio venus en embaraso. Ni legu la faktojn, analizu la konceptojn el nia socia vidpunkto, kaj flanklasu la etajn malpuraĵojn per kiuj oni klopodas por senvalorigi la grandajn verkojn kaj pravigi ĉiujn krimojn.

Flanklasante la hezitojn de Emma Goldman pri tio okazanta en Rusujo, mi opinias, ke kio okazas en Rusujo estas la Diktatoreco. Ni devas konsideri, ke la laboro de socia regenerado ne povas esti altrudita de la disciplinaj bajonetoj. La bajonetoj taŭgas por detrui la estantecon, sed ne por krei la estantecon.

La estonteco devas esti altrudita de la plibonigo, kiun ĝi ofertas, kaj de la edukado, kiun ĝi klarigas. Alivorte: la Diktatoreco, ĉiu Diktatoreco bonas por detrui sistemon kaj meti alian anstataŭe; sed ĝi estas kontraŭefika por eduki homojn, kiuj devas esti regataj, pli ol de ia leĝo, de la individua konscienco. Tial la fiasko de la Komunista Partio pri la verko de rekonstruo.

La Diktatoreco, ĉiu Diktatoreco, havas la solan celon neniigi volojn. Dum temis pri la neniigo, la Diktatoreco bonas. Kaj ju pli da voloĵ oni neniigas, des pli bone la Diktatoreco plenumas sian celon. Sed la Diktatoreco ne havas la privilegion krei aŭ stimuli voloĵn. Kaj por ĉiu periodo de rekonstruado, voloĵ estas tio, kion oni bezonas. La rusa Diktatoreco tro bone plenumis sian taskon neniigi la individuan volon, la kreeman iniciaton de tiuj, kiuj povus kontribui al tio, kion la nova aferstato bezonis kaj, kiam tiu volo, tiu iniciato fariĝis bezona por solvi la novajn problemojn, la iniciato, la volo estis mortaj kaj ne povis plenumi sian komision.

Tial la Diktatoreco devis daŭre trudi per subpremaj leĝoj tion, kio nur povas esti verko de la spontanea iniciato de sendependaj voloĵ. Nenio pli bona por pruvi kion ni diras ol la historio mem de la rusa revolucio. Radikala dum ĝiaj komencoj, ĝi ŝanĝis en kelkaj tagoj, per kelkaj dekretoj, la kapitalisman sistemon, kiu prenis centojn da jaroĵ por organiziĝi; sed, samtempe neniigitaj la individua iniciato kaj la individua kunlaboro de la homoj, kiuj sciis kion oni bezonas por la nova aferstato kaj, ĉar la Diktatoreco nekapablis anstataŭigi la malnovajn normarojn per novaj modeloj, ĝi ree devis, per kelkaj dekretoj, kvankam ne en kelkaj tagoj, remeti tion malnovan kaj uzi ĝin por daŭre produkti kion ili bezonis por la ĉiutaga vivo. La leĝoj nuligantaj la privatajn posedaĵojn kaj konfiskantaj fabrikojn, kiuj en 1917 tiom timigis la universalan burĝaron, estis momentaj leĝoj, oni ne scias ĉu por gajni al si la simpatiojn de la tutmonda revolucia movado kaj peti ties subtenon, aŭ nur esti idoj de tio, kion la Konstitucia Asembleo konsideris, ke endis fari. Fakte tiuj leĝoj tio unika, kion ili faris, estis detruo komencante nenion, klarigante nenion por la estonteco. Neniigi la privatajn posedaĵojn en la kamparo kaj diri al la kamparanoj: "Tie vi havas la teron por ĝ prilabori", ne sufiĉas. Kaj multe malpli kiam oni aldonas:

-Tie vi havas la teron por ĝin prilabori, kaj vi devas doni al mi parton de tio, kion tiu tero produktos.

Kaj tio estis, kion oni diris al la rusaj kamparanoj en 1917, kaj en 1918 oni ilin devigis doni, ne parton, sed ĉion, kion la taskitoj fari tiun kolektadon trovis ĉemane. Tiuj leĝoj, mi ripetas, estis leĝoj de la momento, leĝoj destinitaj esti revizii-taj kaj anstataŭigitaj. Tial ni dubas pri la intenco per kiu ili estis oficialigitaj.

Sed eĉ rekonante, ke ili estus sinceraj, ni konstatas en ili multan oportunismon, oportunismon malbone kaŝitan kaj pli malbone pravigitan, kiam post nelonge oni deklaris la komunismon fiaskon, la privata posedaĵo sur la tero denove estis restarigita kaj oni redonis la fabrikojn al iliaj malnovaj mastroj, asertante, ke la laboristoj ankoraŭ ne kapablis labori per si mem. Ĉu hazarde oni donis al la kamparanoj la rimedojn por libere prilabori la teron, oferante al ili la helpon de la industrio?

Ne. Oni diris al la kamparanoj diris: "prilaboru la teron kaj donu al mi parton." Kaj samtempe, ke oni al ili diris tion, la bolŝevika registaro forprenis la semojn, kiujn ili devis semi, kaj la ĉevalojn, per kiuj ili devas plugi la teron, kaj ĝi enkarcerigis la plej lertajn kamparanojn, kiuj rifuzis transdoni tiujn semojn kaj tiujn ĉevalojn. Oni klopodas por malgravigi ĉi tiun krimon aŭ mallertecon, pledante, ke la registaro bezonis tiujn semojn kaj tiujn ĉevalojn por subteni la armeon, kiu batalis en la enlanda milito kaj kontraŭ la Aliancanoj.

Oni pretekstu kion ajn kaj nomu ĝin krimo aŭ eraro, endas ne proklami la malsukceson de la Komunismo pro tio, ke la bolŝevika registaro malsukcesis en siaj terkulturaj leĝoj. Kaj ĉu estis hazarde, ke oni metis la fabrikojn en la manojn de la laboristoj por ke ĉi tiuj ilin produktigu? Ankaŭ ne. Antaŭe estis individuo, kiu konis sian metion, kiu administris ilin; poste estis komisaro, kiu ne ĝin konis, kiu enofi-

ciĝis ĉekape de ili. Por la laboristoj, ĉio restis egala. Unue ili laboris por mastro; poste laboris por la Ŝtato, mastro pli terura ol la antaŭa. Ĉu endas diri, ke la laboristoj estas nekapablaj, ĉar la bolŝevikaj direktistoj estis tiaj?

Necesas mallongigi kaj konkretigi:

Tio, kio okazis en Rusujo, estas simpla, tiel simpla, ke ĝi estis nenio pli ol ripeto de la Historio! La paganismo, la kristanismo, la absolutismo, la feŭdismo kaj ĉiuj ismoj de la pasinteco faris kion la bolŝevikismo faris kaj faras. Ĉiuj ili adaptiĝis al la medio por povi sukcesi kaj forlasis siajn fundamentajn bazojn cele iĝi alireblaj al la siatempaj pensmanieroj kaj kutimoj. Tiu oportunismo donis al ili la potencon, kaj kun la potenco la rimedojn por ataki ĉiujn idealajn konceptojn, kiuj kontraŭis ilian vivtenadon. Sed ĉar ekzistas leĝo de gravito, kiu pelas ĉiujn estulojn serĉi sian propran ekvilibron, kaj la homo ne ĝin trovis en ĉiuj tiuj sistemoj, ili estis detruitaj kaj sinsekve anstataŭigitaj, kaj la kialo de ilia malvenko kuŝis en ilia triumfo mem, kaj ili malaperis solvinte neniun el la ĉiam ekzistantaj kaj ankoraŭ daŭrantaj problemoj.

En ĉi tiu situacio la Bolŝevikismo ŝprucis al la vivo. Klopodante por superi malfacilaĵojn kaj finsolvi antagonismojn, ĝi sin prezentas kiel peranton inter la kontraŭmetitaj interesoj de la diversaj klasoj kaj klopodas por servi kiel ponto por ke trapasu ĝin ĉiuj novaj energioj, kiuj marŝas al la estonteco.

Ĉu estas aŭ ne sincera tio, kion ĝi diras, ni ne scias, nek ni povas scii, ĉu eblas, ke tio, kion ĝi propagandas, efektiviĝos. Tio unika, kion ni scias hodiaŭ, estas, ke la Bolŝevikismo devas malaperi kaj, ke ju pli frue ĝi malaperos, des pli frue ĝi plenumos sian taskon.

Kaj se ĝi ne malaperas, tio estas: se ĝi formas sian propran korpon kaj klopodas por rezisti, kio estas la plej logika, la Bolŝevikismo iĝos la Nova Socia Mensogo, antaŭkondamnita al morto de la forto aŭ de la malestimo, samkiel es-

tis kondamnitaj al morto ĉiuj aliaj mensogoj per kiuj la ĉiutempaj oportunistoj klopodis por deturni la fluojn de progreso, kiuj kondukis al la supera Homa Idealo: la Anarĥio.

Kaj nenio gravas al ni, kion oni diras hodiaŭ, kaj la ŝajna forto, kiun la Bolŝevikismo povas havi. Kiam la agitado de la konfuzismo kaj la kontraŭdiroj jam ne ekzistos, la Bolŝevikismo ankaŭ ne ekzistos. Tiu estas la destino de ĉiuj ideoj, kiuj intencas servi kiel ponto inter la pasinteco kaj la estonteco. Komence la pasinteco ilin timas kaj fine ilin adaptas al si. Komence la estonteco ilin apogas kaj fine ilin detruas. Homa leĝo estas, ke ĉio, kio stagnas, pereas. Kaj la Bolŝevikismo ne nur stagnas, sed ke ĝi estas la stagnanta akvo de la konservativaj fortoj de la Revolucio, kiuj estis tro radikalaj por enviciĝi inter la burĝaro, sed kiuj estis tro konservativaj por sekvi la eksterordinaran marŝon de la anarĥismaj ideoj.

Kaj dume estas la devo de ĉiu sincera homo, kiu entuziasme laboras por krei mondon de libereco kaj frateco, perfingre montri la Bolŝevikismon kaj krii per la tuta energio de siaj konvinkoj:

Ĉu la bolŝevikismo? La Nova Mensogo!

J. DE BORRAN.

1-a ARTIKOLO

La Tombejo de la penso. Mia dujara silento en Rusujo. Kalumnioj de la burĝa gazetaro. Kial mi ne volis paroli antaŭe. Devo al la revolucio.

Dum mia dujara restado en Rusujo aperis en la usona gazetaro pluraj artikoloj, kiuj laŭdire estis intervjuoj, kiujn iliaj aŭtoroj havis kun mi. Kelkaj diris, ke mi transformiĝis, ke mi ne plu kredis je la revolucio kaj, ke mi min konvinkis pri la bezono de registaro. Eĉ estis ĵurnalo, kiu rakontis la sensacian fabelon pri usona flago lokita en mia ĉambro al kiu mi starigis altaron. Unuvorte, ke mi fine fariĝis dimanĉa lerneja instruistino, ke mi pentopagis miajn pekojn kontraŭ la usona registaro.

Ĉio ĉi kompreneble estas kompleta absurdaĵo. Mi neniam estis pli konvinkita pri miaj ideoj, kaj neniam havis pli da pruvoj de la logiko kaj justeco de la Anarĥio. Krome mi donis neniun intervjuon, nek estintus eble al mi paroli pri Rusujo dum la unua jaro de mia restado tie. Mi tiam opiniis kaj daŭre opinias nun, ke la rusa problemo estas tro komplika por facile paroli pri ĝi. Tial ŝajnas al mi, ke la libroj verkitaj de personoj, kiuj restis en Rusujo semajnojn aŭ monatojn, estas supraĵaj.

Dum mi mem blinde-palpe iris, neniam diskonigis definitivan opinion. Kaj kvankam mi povintus fari ĝin, neniam ĝin farintus al ĵurnalistoj. Mi opiniis bezona silenti, dum la imperiismaj fortoj sieĝis Rusujon. Sed kvankam ne okazintus tio, tridekjara sperto en kontakto kun ĵurnalistoj pruvis al mi, ke ili ne estas tre verdiraj (kompreneble estas esceptoj), kaj certe ne estus al ili, al kiuj mi elmetus miajn opiniojn pri tiel komplika afero.

Tamen nun la tempo de la silento pasis kaj mi opinias bezona paroli. Mi ne preteratentas la malfacilaĵojn, kiujn mi alfrontos. Mi scias, ke mi estas atakota de la reakciaj malamiĵoj de la rusa revolucio, kaj ekskomunikata de kiuj sin konsideras kiel ĝiajn amikojn kaj bedaŭrinde persistas konfuzi la bolŝevikan partion kun la Revolucio.

Tial mi opinias bezona klare precizigi mian sintenon pri ambaŭ.

Antaŭ kvar jaroj la usona registaro akuzis min pri perfido, forpelis min el mia hejmo dum la nokta mallumo kaj min eligis el la lando.

Kaj ĉio ĉi, ĉar mi levis mian voĉon kontraŭ la mondmilito, la proksimiĝontaj detruo kaj ruino, kaj la dolora perdo de vivoj. Tiu estis mia krimo. Kaj de tiam ĝis hodiaŭ multaj konstatis, ke ĉiuj ni, kiuj ne lasis nin treni per la uragano de la milito, pravis, ĉar la milito estis kreita kaj subtenita de profitoj por la kapitalistoj, kaj tio pri "milito por la Demokratio" kaj "milito por fini la militon" estis nur fabelaĵoj.

Malgraŭ la klopodoj de iuj, la reĝo Malsato, kun la grimaco de la Morto surlipe, fiere promenis sur la ruinigitaj kampoj, dum tiuj, kiuj ĝin provokis, ĝuis la gajnojn, kiujn al ili havigis la buĉado.

Kaj ne kontentaj per la milionoj da vivoj perditaj kaj la duono de la tero detruita, ili enfermis la mondon en karcero, kie la Libereco de la popoloj, gajnita koste de tiom da oferoj, restis ligita al ilia kaprico de despotoj.

La demokratia Usono, alitempe "tero de la Libereco, hejmo de la herooj"; Anglujo, malnova azilo por la tutmondaj ribelantoj; Francujo, kiu proklamis la rajtojn de la Homo, naskiĝejo de la Libereco, kaj multaj aliaj popoloj, kio ili nun estas, sed spiritaĵoj dezertoj kun siaj pordoj fermitaj al la gastamo kaj al ĉia progresema iniciato?...

Nur la muĝoj de la amasoj da senlaboruloj kaj la krioj de la laboristaj gvidantoj malliberigitaj kaŭzas malordon en la malluma silento de tio, kion ni povus nomi la Tombejo de la Penso.

Certe la militmastroj povas fieri pri sia laboro. La fera kalkanumo preplatigas la kolon de la popoloj. La triumfo estis kompleta. Sed tamen io ankoraŭ restas: tie estas Rusujo!

Tiuj du nedisigeblaj amikoj - Altaj Financoj kaj Militismo - ne prenis en konsidero la Rusan Revolucion. Kiel tiu popolo kuraĝis provoki internacian konflikton, kiu facile povus ekbruligi la flamon de la revolucio tra la tuta mondo en la ĝusta momento, kiam la Militismo kaj la Kapitalo kalkulis je la definitiva triumfo? Endis fari ion por detruĝi tiun danĝeran flamon, kiu estas la rusa revolucio.

Dum la milito kontraŭ Germanujo oni hipokrite asertis: "Ni ne batalas kontraŭ la germana popolo, sed kontraŭ la germana militismo". Kaj la sama hipokrita aserto aŭdiĝis kiam la sankta krucmilito kontraŭ Rusujo. «Ĝi ne estas kontraŭ la rusa popolo, sed kontraŭ la bolŝevikoj. Ili instigis la revolucion kaj devas esti ekstermitaj».

Kaj la ofensivo kontraŭ Rusujo komenciĝis. La intervenistoj mortigis milionojn da rusoj, la blokado pereigis per malsato kaj malvarmo milionojn da virinoj kaj infanoj, kaj Rusujo iĝis dezerto de agonioj kaj malespero. Oni detruis la rusan revolucion kaj la bolŝevika partio sin firmigis en la potenco. Ĉi tio estas la rezultato de kvar jaroj da konspiro kontraŭ Rusujo fare de la imperiistoj de la mondo.

Sed, kiel povis tio okazi?

Tute simple, la rusa popolo, kiu estis la sola, kiu vere faris la revolucion kaj estis decidita ĝin defendi ĉiakoste, estis tro okupita ĉe la militfronto por atenti la malamikojn, kiujn ĝi havis hejme. Kaj dum la rusaj laboristoj kaj kamparanoj ofe-

ris sian vivon en la ŝirmfosaĵoj, ĉi tiu interna malamiko iom post iom kaptis la potencon kaj malrapide, sed lerte, kreis la centralizan ŝtaton kaj detruis la sovetojn.

Ĉi tiu ŝtato, detruanto de la revolucio, hodiaŭ perfekte povas esti komparata pri despotismo kaj burokratismo kun kiu ajn el la registaroj de la plej altaj potencoj el la mondo.

El mia dujara observado, mi povas diri, ke se ne okazintus la ekstera milito, la rusa popolo pli frue konstatintus la internan danĝeron kaj detruintus ĝin, kiel ĝi faris kun Kolĉak kaj Denikin. Liberaj de la atakoj de la reakciuloj, la popolo komprenintus la verajn tendencojn de la Bolŝevika Partio, ĝia sentaŭgeco por rekonstrui Rusujon, kaj la amasoj mem da laboristoj inokulintus novan vivon al la paralizita korpo de la lando. Ĉu eble la popolo farintus la samajn erarojn, kiujn faris la bolŝevikoj? Sendube jes; sed almenaŭ ĝi lernintus dependi de si mem, de siaj propraj fortoj kaj iniciatoj, kio estas la sola afero, kiu povintus savi la revolucion.

Ŝuldiĝas al la stulteco de kelkaj eksrevoluciuloj, kiuj petis la intervenon, kaj al la imperiistoj, kiuj ĝin subtenis per sia mono, ke la rusa revolucio, la plej granda revolucio de la historio, estis malvenkita. Kaj ankaŭ ŝuldiĝas al ili, ke la bolŝevikoj, akuzataj kaj persekutataj de la kapitalistaj potencoj, povas daŭre sin prezenti kiel la sankta simbolo de la Socia Revolucio.

Mi decidis elmeti ĉi tiun fatalan elreviĝon pri la rusa revolucio, ne ĉar mi paciĝis kun la kapitalistaj registaroj, sed ĉar mi volas antaŭmalhelpi malbonon por la estontaj revolucioj montrante la erarojn de la bolŝevika registaro. Sed estis la sperto pli ol ĉiuj teorioj, kiu pruvis la senefikecon de la registaroj, de kia ajn registaro, kaj la malhelpon, kiu ili estas, al la agado de la homamasoj. Kaj mi decidis elmeti tion okazintan en Rusujo ne pro tio, ke mi perdis fidon je la Revolucio, sed ĉar mi estas konvinkita, ke la estontaj revolucioj rekte

iros al la malsukceso, se tio, kion Lenino nomas "Militistigita Komunismo", sin trudas al la mondo.

Mi konsideras devon por mi skribi kion mi skribas: devo al la revolucio, najlita al la bolŝevika kruco; devo al la martireco de la rusa popolo, kaj devo al la tuta mondo, trompita. Kaj mi volas plenumi ĉi tiun devon malgraŭ la misinterpretoj, kiujn la reakciuloj povas doni al miaj vortoj, kaj malgraŭ la kritikoj de kelkaj radikaluloj, sensciaj pri tio okazanta en Rusujo.

2-a ARTIKOLO

La fortoj, kiuj detruis la revolucion.

La rusa revolucio, kiel socia kaj ekonomia ŝanĝo, kiu klopodis por forpeli la kapitalismon kaj starigi la Komunismon, devas esti konsiderata bankrota.

Se oni analizas la plurajn faktorojn, kiuj detruis la revolucion, gravas konsideri la rolon plenumitan de la kontraŭrevoluciuloj. Fakte iliaj krimoj estas sufiĉe abomenindaj por ilin kondamni dumvive. La rusaj patriotoj (monarkistoj, konstituciaj demokratoj) plenigis la mondon per siaj porintervenaj krioj. Kio gravis al ili, ke milionoj da iliaj samcivitanoj kaj milionoj da alilandaj laboristoj mortis pro la malpia milito kontraŭ Rusujo?

Ili loĝis en sekura loko kaj ekster la danĝero de la kugloj de la soldatoj, de la malliberejo, de la Ĉoko kaj de la detrua malsato. Ili do povis ludi esti patriotoj. Sed ni lasu ĉi tion, ĉar ĝi jam estas tro konata. Tio, kion oni ne scias, estas, ke la rusaj kaj aliancitaj intervenistoj ne estis la solaj faktoroj en la granda socia dramo, kiu finiĝis per la morto de la rusa revolucio. La aliaj faktoroj estis la bolŝevikoj mem. Kaj temas pri tio, pri kio ni volas paroli.

Eble la rusa revolucio naskiĝis jam kondamnita. Ĉar ĝi venis trenita de la kvar jaroj da milito, kiuj neniigis ĝiajn plej bonajn kvalitojn kaj detruis ĝiajn plej bonajn kaj riĉajn regionojn, eblas, ke la revolucio ne havintus sufiĉe da forto por rezisti la frenezajn furiozojn de la resto de la mondo. La bolŝevikoj asertas, ke pri tio kulpis la rusa popolo, kiu ne havis sufiĉe da persistemo por rezisti la malrapidan kaj doloran proceson de la ŝanĝo realigita de la revolucio. Mi ne opinias tion.

Kaj kvankam ĉi tio verintus, tamen mi insistas pri tio, ke ne estis tiel gravaj la atakoj de ekstere, kiel la malprudentaj kaj kruelaj metodoj, kiuj interne strangolis la revolucion kaj transformis ĝin en malamindan jugon metitan sur la kolon de la rusa popolo. La marksisma politiko de la bolŝevikoj, unue laŭdita kiel nepra por la revolucio kaj, kiu estis forlasita post kiam ĝi provokis la malkontenton, la antagonismon kaj la mizeron, estis la realaj faktoroj, kiuj detruis la grandan movadon kaj perdigis la fidon de la popolo.

Se povas esti ia dubo pri tio, kion konsistigas la plej granda danĝero por la revolucio (eksteraj atakoj, internaj ribeloj), la rusa sperto malaperigis ĉiujn ilin. La kontraŭrevoluciuloj, subtenataj de la mono kaj la armeo de la eksterlanda kapitalismo, malsukcesis ne tiel pro la heroeco de la Ruĝa Armeo, kiel pro la revolucia entuziasmo de la popolo mem, kiuj repuŝis ĉiujn atakojn. Tamen la revolucio restis detruita. Kiel do oni povas klarigi ĉi tiun fenomenon?

La ĉefajn kialojn ne malfacilas klarigi. Se Revolucio devas postvivi malgraŭ ĉiuj malhelpoj, necesas, ke ĝia fajro daŭru ĉiam vivplena por la popolo. Alivorte: necesas, ke la homamasoj konstante sentu, ke la revolucio estas verko de ili mem, ke ili partoprenas en la aktiva tasko konstrui la novan vivon.

Dum mallonga periodo de la revolucio de Oktobro, la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj vere estis la mastroj de la situacio. Sed baldaŭ la nevidebla fermano de la bolŝevikismo komencis direkti la ŝtataferojn kaj apartigis la Revolucion disde la popolo; kaj la popolo disiĝis de la Revolucio. De tiu momento komenciĝis la bolŝevika ŝtato.

La bolŝevikoj starigis la Ordenon de la Jezuitoj de Markso. Mi ne volas diri per tio, ke la bolŝevikoj ne estas sincerej. Estis ilia marksismo, kiu determinis ilian agadon.

La diversaj uzataj metodoj detruis la realigon de ĝia celo. Komunismo, Socialismo, Libereco, Egaleco, por ĉio, por kio la rusa popolo elportis la suferon kaj faris la revolucion, sin senkreditigis pro la uzataj rimedoj, pro la jezuita preteksto pri tio, ke la celo pravigas la rimedojn.

La plej senbrida cinismo anstataŭis la Idealismon, kiu distingis la revolucion de Oktobro. La inspiro restis paralizita, la popola intereso malaperis; la apatio kaj indiferenteco anstataŭis la entuziasmon kaj la kreaĵojn energion. Estis nek la interveno nek la blokado. Kontraŭe: sole la interna politiko de la bolŝevika ŝtato respondecas pri la fiasko de la revolucio kaj ankaŭ respondecas pri la malamo, kiun la rusa popolo sentas pri ĉio, kio originas el ĝi.

«Por kio utilas la ŝanĝoj?» -argumentas la kamparanoj. «Ĉiuj leĝoj estas egalaj: la popolo devas suferi».

Estis ĉi tiu fatalismo, firmigita de jarcentoj da submetiĝo, kiu kondukis la popolon al la indiferenteco pri ĝia propra verko kaj al ĝia pasiva rezisto kontraŭ la bolŝevikismo. Ĉu la komunistoj nun lernis, ke la celo ne ĉiam pravigas la rimedojn?

Se oni diras la veron, Lenino ofte pentas. En ĉiu nova Kongreso li alportas sian novan «pro mia kulpo», kaj en ĉiu nova asembleo li prezentas sian «mi pekis». Iam juna komunisto diris al mi:

«Ne min surprizus, ke iutage Lenino asertus, ke la Revolucio de Oktobro estis eraro».

Vere Lenino rekonas siajn erarojn, sed tio neniel al li malhelpas daŭrigi la saman politikon. Ĉiu nova eksperimento, kiun oni klopodas por trudi al la popolo, estas proklamita de Lenino kaj liaj partianoj, kiel la senerara rimedo, kiu devas alporti la pacon kaj prosperon al Rusujo, kaj ve! al tiu ku-

raĝanta kontraŭdiri lin. Ĉi tiu estos kontraŭrevoluciulo, perfidulo kaj, pro tio, enkarcerigita.

Post kiam li trompis Rusujon kaj la tutan mondon dirante, ke la socia strukturo en Rusujo estas la Komunismo, nun Lenino aperas en la lasta Tutrusa Kongreso dirante, ke tia kredo estis erara, ke en Rusujo ne ekzistis la Komunismo. Estas miloj da kamaradoj en la malliberejo pro tio, ke ili diris la samon, kaj en la malliberejo ili daŭre restas malgraŭ ke Lenino akceptis kion tiuj kamaradoj asertis, kaj kio rezultigis, ke ili estis komdanitaj.

Interese estus klarigi la diversajn metodojn uzatajn de la bolŝevikoj en ties klopodo por trompi la popolon; sed ne estas la celo de ĉi tiu artikolo detale laŭvice elnomi ilin.

Mi nur limigos elmeti la ĉefajn:

La paco de Brest-Litovsk signis la komencon de ĉiuj postaj malfeliĉoj. Ĝi estis intenca neado de ĉio, kion la bolŝevikoj proklamis: paco sen kompenso; libera memdecido de ĉiuj popoloj; neniigo de la sekreta diplomatio. Tamen ili interkonsentis pri ĉio ĉi kaj agis samkiel kiu ajn burĝa registaro agas.

La prezo de ĉi tiu paco estis la perfido de Latvujo, Finnlando, Ukrainujo kaj Belorusujo aŭ Blanka Rusujo, kaj la rezulto estis pluraj jaroj da enlanda milito, la dissplitiĝo de la revoluciaj fortoj kaj la komenco de la ruĝa teruro, kiu ankorau daŭras.

La kamparanoj de Ukrainujo kapablis forpeli la germanan invadanton kaj ankaŭ kapablis ne forgesi la bolŝevikan perfidon. La konstanta ĉeesto de miliono da soldatoj en Ukrainujo por "elpurigi la banditojn" atestas la korinklinon de la kamparanoj de Ukrainujo al la bolŝevika ŝtato. La konfirmo de la pactraktato, kiun Trockij rifuzis subskribi, kiun Radek (tiam en germana malliberejo) deklaris kiel la bankroton de la re-

volucio, estis la signo de longa sekreta rezisto fare de la kamparanoj kontraŭ la Ŝtato.

La kamparanoj, kiuj unuiĝis kun la laboristoj ĝis la perfido de Brest-Litovsk, disiĝis de ili kaj de la komunista partio, kiu asertis reprezenti la kamparanojn kaj laboristojn. Lenino postulis la konfirmon de la pactraktato, kiel aspiron kaj rime-don por firmigi la revolucion. Estis unu el liaj eraroj; sed tiu plej multekosta, ĉar estis tiu, kiu strangolis la Revolucion.

3-a ARTIKOLO: DEVIGA KOLEKTADO

La plej granda eraro el la bolŝevikismo. La krimoj de la Ĉoko.

La *Razvyorstka*, la sistemo de deviga kolektado de nutraĵoj, tre baldaŭ sekvis la Pacon de Brest-Litovsk. La bolŝevikoj diros, ke ili estis devigitaj uzi ĉi tiun rimedon, ĉar la kamparanoj rifuzis provizi la urbon. Ĉi tio veras nur parte. Veras, ke la kamparanoj rifuzis liveri siajn produktaĵojn al la registaraj agentoj... Ili postulis la rajton intertrakti kun la laboristoj, sed oni al ili neis ĉi tion. La nekompetenteco de la bolŝevika reĝimo kaj la korupto de ties burokrataro ege kontribuis ĉagreni la kamparan loĝantaron. La fabrikantoj promesis al la kamparanoj la interŝanĝon de siaj produktoj, sed ĉi tiuj neniam alvenis kaj alveninte, ili estis en malbona stato kaj mankis unuoj.

En Ĥarkivo mi vidis pruvita la nekompetentecon de la centraliza burokrata maŝinaro. Pakoj de terkultura maŝinaro ripozis en fabrikmagazeno. Estis ordono ricevita el Moskvo, kiu devis esti plenumita en la limtempo de "du semajnoj, sub puno de sabotado". Ili estis fabrikitaj en tiu periodo, kaj ses monatoj jam pasis sen tio, ke la "centraj" aŭtoritatoj faras penojn disdoni ilin inter la kamparanoj, kiuj petegadis ilin. Ĉi tio estis unu el la sennombraj ekzemploj de la maniero, kiel la sistemo de Moskvo "funkciis" aŭ, pli ĝuste, kiel ĝi ne funkciis. Ĉu estas do surprize, ke la kamparanoj perdis ĉian fidon je la lerteco de la bolŝevika ŝtato por direkti aferojn, kiel decas? Kiam la bolŝevikoj rimarkis, ke la kamparanoj akceptis nenian kaŝoladon nek flatadon por altrudi al ili la fidon, estis kiam oni elpensis la *Razyorstka*-on. Pli bona sistemo por antagonistigi kaj ĉagreni la kamparanojn ne povus esti elpensita.

Ĉi tiu fariĝis la teruro de la kampara loĝantaro. Ĝi al ili rabis ĉion, kion ili havis. Nur la estonteco povos doni taŭgan priskribon de la teruraj sekvoj de tiel frenezaj disponoj, kun ilia granda ofero de vivoj kaj detruo.

Ŝajnos neeble, sed estas bone konata fakto en Rusujo, ke la sistemo de la *Razvyorstka* parte respondecis pri la nuntempa malsatego. Ĉar oni senigis la kamparanojn ne nur je la lasta farunero, sed ke ankaŭ oni al ili ofte rabis la semojn, kiujn ili konservis por la sekva semado. Kompreneble la malabundeco estas la ĉefa kaŭzo de la terura situacio ekzistanta en la distriktoj de la rivero Volgo. Tamen estas fakto, ke se la kamparanoj povintus libere kaj ĝustatempe semi, almenaŭ kelkaj distriktoj povus iom malpliigi la malsategon de la Volgo. La puna ekspedicio, kiu sekvis la reziston de vilaĝeto kontraŭ la registaraj nutraj kolektantoj, ĉiam komandata de la komunistoj, atakis loĝlokon per armiloj kaj ĝin detruis. Vane la kamparanoj protestis al la lokaj aŭtoritatoj kaj fine al tiuj en Moskvo. Ili donis al ili nenian kontentigon. En Rusujo estas en modo signifoplena anekdoto, kiu klarigas la vidpunkton de la kamparanoj rilate la bolŝevikan nutraj kolektosistemon. Komitato el kamparanoj estis akceptita de Lenino. «Saluton, *dedushka*» (avĉjo), Lenino diris al la plej maljuna el la kamparanoj: «vi jam devas esti kontenta, vi havas la teron, la brutaron, la kokinojn, vi jam havas ĉion».

«- Jes -respondis la maljunulo-, jes, paĉjo, la tereno estas mia, sed la panon vi forprenas; la bovino estas mia, sed vi forprenas la lakton; la kokinoj apartenas al mi, sed la ovojn estas viaj. Dio vin benu, paĉjo».

La tiel trompataj kaj prirabataj kamparanoj ribelis kontraŭ la komunistoj. La *Razvyorstka*, la puna ekspedicio, la brutalaj metodoj kaj la maljustaĵoj rezultigis fortan kontraŭrevolucion senton en la lando. Kelkaj verkistoj, skribante pri Rusujo,

jo, akceptis la interpreton de la Registaro pri la opozicio de la kampanoj.

La s-ro Bertrand Russell, la plej sincera kaj honesta kritikanto, kiu skribis pri Rusujo, diras en "La praktiko kaj teorio de la Bolŝevikismo": «Oni devas diri, ke la kialoj de la kampanoj por ĉagreniĝi pro la bolŝevikoj estas tre maltaŭgaj». Evidentas, ke la s-ro Russell ne konstatis la efikojn de la *Razvyorstka*, kontraŭe li ricevintus alian tre malsaman impreson.

La pura vero estas, ke se la rusaj kampanoj ne estus tiel apatiaj kaj pasivaj, la bolŝevika ŝtato ne daŭrintus tiel longe. Malgraŭ tio, ilia pasiva rezisto preskaŭ finis la bolŝevikan reĝimon. Estis ĉi tio kaj ne la fakto, ke la *Razvyorstka* estis malhumana, kio devigis Leninon al lia nuna sistemo de imposto kaj libera komerco.

La rusaj kooperativoj signifis grandan kulturen kaj ekonomian forton en la vivo de la popolo. En 1918 ili kovris la landon per reto da 25.000 filioj kun entute 9 milionoj da membroj. La kapitalo, kiun ili tiam investis, estis de 15 milionoj da rubloj; dum la negoco farita la antaŭan jaron estis de 200 milionoj.

Kompreneble la kooperativoj ne estis revoluciaj organizaĵoj, tamen ili estis nemalhavebla peranto inter la kamparo kaj la urbo.

Ajna kontraŭrevolucia elemento, kiu ekzistintus en la kooperativoj, povus esti forigita sen la detruo de la tuta organizo. Sed la permeso al la kooperativoj por daŭrigi iliajn funkciojn estus malpliigi la centralizan potencon de la ŝtato. Tial la kooperativo devis esti "likvidita", kaj ĉi tiel oni detruis grandan faktoron de la rusa rekonstruo.

Nun, kiam la kooperativoj ne plu ekzistas kaj sennombraj viroj kaj virinoj, kiuj faris tian grandiozan laboron, estingis

sian vivon en la bolŝevikaj forgeskeloj, Lenino ree ripetas «pro mia kulpo». La kooperativoj ree estas starigitaj kaj la kadavro reviviĝis. Nelonge antaŭ ol la kooperativoj ree estis leĝigitaj, Pedro Kropotkin -jam morte malsana- esprimis la deziron, ke la ses kooperativistoj de *Dimitrov* estu liberigitaj. Li konis ilin intime, kiel bonajn kaj sindonemajn laboristojn.

Ili pasigis 18 monatojn en *Botirka*, malliberejo de Moskvo, pro sia lojaleco al la laboro. Ili estis liberigitaj nur kiam Lenino deklaris, ke la kooperativo devas esti revivigita. Estas preskaŭ neverŝajne, ke la kooperativoj reakiros siajn iamajn forton kaj gravecon en la bolŝevika ŝtato.

Nomi la nunan Rusujon, Soveta Rusujo, aŭ la bolŝevikan reĝimon Soveta Registaro estas absurdaĵo. La sovetoj datas sian naskiĝon de la Revolucio de 1905 kaj renaskiĝis post la februara revolucio. Ili havas tiel rilaton al la bolŝevika registaro, kiel al la kristana eklezio.

La Sovetoj de kamparanoj, laboristoj, maristoj kaj soldatoj estis la spontanea esprimo de la liberigitaj energioj de la rusa popolo. Ili reprezentis la bezonojn de la organizitaj homamasoj post jarcentoj da silento. Jam dum Majo, Junio kaj Julio 1917 la vigla forto de la sovetoj instigis la laboriston preni la fabrikojn kaj la kamparanojn la terojn.

La sovetoj rapide disvastiĝis tra la tuta Rusujo, instigis la flamojn de la revolucio de Oktobro kaj daŭre funkciis multajn monatojn post tiu fakto.

Kelkal sociaj politikistoj ne povis kompreni ilian gravecon kaj la sovetoj simple ilin forbalais. Same okazus al la bolŝevikoj, se ili klopodus por haltigi la antaŭenpuŝon de ĉi tiu movado.

Sed Lenino estas tre ruza jezuito kaj sin miksis en la popularan krion: «Ĉia potenco al la sovetoj». Kiam li kaj liaj satelitoj estis sekuraj en la posteno, estis kiam komenciĝis la

detruo de la Sovetoj. Hodiaŭ ili estas nenio pli ol - kiel ĉio en Rusujo - ombro kun la substanco detruita.

Nun la Sovetoj nur propagandas la decidojn de la Komunista Partio. Ne estas alia politika opinio diskonigebla ol ĉi tiu. La metodo de balotadoj uzata de la komunistoj plenigus la "*Tammany Hall*"-on¹ per envio. Kiam mi venis en Rusujon, eminenta komunisto diris al mi, ke «Boss Murphy² kaj Tammany Hall havas nenion por instrui nin». Komence mi pensis, ke la individuo ŝercis, sed poste mi eksciis, ke li diris la veron.

La bolŝevikoj uzas ĉiujn rimedojn por pliigi la voĉojn por la komunistoj. Se la petegoj senrezultas, tiam ili ekminacas per la perdo de la *payok*³ aŭ per la aresto. La voĉdonantoj jam scias, kio povas okazi, kaj evidentas kial la komunistoj ĉiam atingas plimulton da voĉoj.

Malgraŭ tio, la menŝevikoj, la sociaj revoluciuloj de maldekstro, kaj eĉ la anarĥiistoj havas siajn elektitajn reprezentantojn, kio estas tre malfacila en la bolŝevika Rusujo.

Sen gazetaro, senigitaj je libereco de esprimo, kaj sen laŭleĝa permeso por propagando en la metiejoj, estas preskaŭ miraklo, ke la opoziciaj partioj havas reprezentantojn en la sovetoj.

Sed koncerne esprimi iliajn opiniojn kaj esti aŭditaj, estus preskaŭ same, kiel ili ne estus interne. La komunistoj sin okupas pri tio, ke neniuj, kiu ne estas komunista, povas esti

1 NeT (el la wikipedio): Tammany_Hall estis novjorka korupta politika organizaĵo fondita en 1786. Ĝi estis politika aparato de la Demokrata Partio, kiu ludis gravan rolon en Novjorko helpante la enmigrintojn, precipe la irlandanojn, por la aktiva partoprenado en la usona politiko de la 1790-aj ĝis la 1960-aj jaroj. Ĝi kontrolis la nomumojn de la Demokrata Partio kaj la patronecon en Manhatano.

2 NeT: Charles Francis "Silent Charlie" Murphy, ankaŭ konata kiel Boss Murphy, estis usona grava politikisto kaj estro de la Tammany Hall de Novjorko. Murphy respondecis transformi la reputacion de Tammany Hall de koruptado al respektindeco, kaj etendi ĝian politikan influon je tutlanda nivelo.

3 NeT: rajtigilo de la laboristoj por akiri nutraĵojn, ktp.

aŭdata. Okaze, ke anarĥiisto estas elektita por la soveto, la registaro ĝenerale malakceptas rekoni lian mandaton kaj baldaŭ trovas iun pretekston por sendi lin al la Ĉoko.

En 1920 mi ĉeestis en balotada mitingo, kiu okazis en klubo de fabriko en Moskvo. Jam estis la dua fojo, ke la registaro malakceptis rekoni la laboristan kandidaton - anarĥiisto. Malgraŭ ke la kontraŭa kandidato en tiu distrikto estis Semashko, la Komisararo pri Sanservo, la laboristoj triafoje elektis anarĥiiston. Vane Semashko plenumis misuzojn kaj falsajn deklarojn, vane svingis siajn pugnojn antaŭ la vizaĝoj de la laboristoj, kaj ĵetis malbenojn sur iliajn kapojn. La laboristoj priridis kaj mokis lin, kaj elektis anarĥiiston. Malmultajn monatojn poste li estis arestita pro iu preteksto, kaj estis liberigita post longdaŭra malsatstrikto, kaj ĉi tio okazis, ĉar la Angla Komisiono de laboristoj tiutempe estis en Moskvo, kaj la bolŝevikoj ege deziris eviti la skandalon. Antaŭ ol mi forlasis Moskvon la 10-an de decembro 1921, tri anarĥiistoj, membroj de la Soveto, estis arestitaj.

Unu estis ekzilita el la ĉefurbo, la aliaj du estis akuzitaj pri banditeco kaj "kaŝa konspiro", akuzo, kiu estis punita per la mortpafo, sen juĝproceso kaj defendrajto.

Ili estis tro sinceraj en la Soveto kaj sekve endis forpeli ilin. Oni povas klare konstati, ke nek la Soveto de Moskvo nek iu ajn alia Soveto havas voĉon aŭ sendepende funkcias. Eĉ ne la ordinara komunisto havas multan paroliberecon. En la Sovetoj same kiel en ĉiu bolŝevika registaro la "diktatoreco de la proletaro" estas en la manoj de malgranda grupo, la interna rondo reganta, ĝi sola, Rusujon kaj la popolon. Tio, kio estis idealo, la libera esprimo de la laboristo, la kamparano kaj la soldato, iĝis farso, kiun la popolo nek volas nek komprenas...

4-a ARTIKOLO: LA ĈOKO⁴

Ĝia celo kaj agmaniero. Pli krimaj ol la sbiroj de la carismo. La Mortpuno.

La Ĉoko, la Tutrusa Eksterordinara Komisiono, estas sendube la plej nigra disono de la bolŝevika reĝimo. Cele al la lukto kontraŭ la kontraŭrevolucio, la sabotado kaj la spekulacio ĝi estis organizita nelonge post la enpotenciĝo de la bolŝevikoj. Komence la Ĉoko estis direktita de la Komisararo pri Internaj Aferoj, la Sovetoj kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio.

Iom post iom ĝi iĝis la plej potenca organizaĵo en Rusujo. Ĝi estis ne nur ŝtato ene de la ŝtato mem; sed ke ĝi estis ŝtato super la ŝtato. La tuta Rusujo, eĉ la plej malproksima vilaĝeto, estas kovrita per reto de la Ĉoko. Ĉiuj fakoj de la vasta maŝinaro de la burokrataro havas eksterordinaran komisionon ĉiopovan koncerne la vivon aŭ morton de la rusa popolo. Necesus la majstra plumo de Dante por klarigi al la publiko la inferon kreitan de ĉi tiuj organizaĵoj, la brutaligon, la memdetruantan efikon, kiun ĝi havas sur la komisionojn mem, la timon, malfidon, malamon, suferojn kaj mortojn, kiujn ĝi alportis al Rusujo.

La estro de la Tutrusa Eksterordinara Komisiono estas Dzerĵinskij. Li, samkiel ĉiuj membroj akompanantaj lin, estas "fidindaj" komunistoj. Dzerĵinskij diris en publika deklaro: «Ni teruras la malamikojn de la soveta registaro... Ni havas la povon sturmi, konfiski la varojn kaj kapitalojn, fari arestojn, enketi, juĝi kaj kondamni kiujn ni konsideras kulpaj, kaj ple-numi la mortpunon».

4 NeT: nomo devenanta de Ĉ.К., komencaj literoj de la rusa nomo de la unua soveta politika polico [ЧК - чрезвычайная комиссия]

Alivorte la Ĉoko estas spiono, policisto, juĝisto, provoso kaj ekzekutisto. Li plu diras interalie: «Kiam oni traktas la malamikojn de la Soveta Rusujo, necesas uzi torturmetodojn por atingi iliajn konfesojn, kaj poste forsendi ilin al la alia mondo».

La leganto ne devas kredi, ke la Ĉoko progresis de post 1918. La pasintan someron, kiam oni malkovris la nomitan komploton de prof. Tagantseff en Petrogrado, ĝi uzis la metodon de la torturo per la soifo, regalis per batado, kaj uzis aliajn eminente "revoluciajn" rimedojn.

Ĉi tiu informo venis al mi, ne pere de kontraŭrevoluciuloj, sed pere de sincera komunisto, kiu estis unu el la arestitoj, kaj sekve atestanto de la rezultatoj de la ĉoko-aj metodoj. Ĉu komunisto arestita inter la kontraŭrevoluciuloj? Kiel li troviĝis tie? Tio estas tre simpla. Kiam la Ĉoko etendas sian reton, ĉi tiu kaptas tiel la senkulpulon, kiel la kulpulon; la plejmulto estas senkulpa.

Kiel do oni povas kredi, ke sesdek ok homoj implikiĝis en konspiro sen tio, ke la tuta urbo ĝin sciis? Tamen sesdek ok homoj estis mortpafitaj pasintan someron en Petrogrado pro la "komploto" de Tagantseff. Kaj ĉi tio estas malgranda procento de la senkulpuloj, kiuj mortis en la subteraj etaĝoj de la Ĉoko.

Oni multfoje postulis de la registaro neniigi la potencojn de ĉi tiu terura organizaĵo. Ĉi tion oni klopodis por fari dum la aŭtuno de 1920 en Moskvo, sed tuj "la krimo kaj la rabado" multiĝis. Kompreneble la Ĉoko devis pruvi, ke ĝi estas nemalhavebla por la bolŝevika ŝtato. Pro tio oni donis solenan dankon al Dzerĵinskij, kaj ĝi estis publikigita en *Pravda*.

Zinovjev, dum unu el la kunsidoj de la Soveto de Petrogrado, diris, ke Dzerĵinskij estis «sanktulo sindona al la revolucio». La historio de la nigra epoko estas plena de tiaj

sanktuloj. Kiom terure estas, ke la bolŝevika reĝimo devas imiti la nigran pasintecon.

Rilate tion, interesas rememori la decidon preniton de la bolŝevikoj en 1917, kiam la provizora registaro klopodis por restarigi la mortpunon por la armeodizertintoj. Tiam la bolŝevikoj energie protestis kontraŭ tia brutaleco. Ili manifestis kiom barbara estis la mortpuno kaj kiom malnobliga, ke ĝi estis por la homaro. Post la revolucio de Oktobro, dum la Dua Tutrusa Kongreso de la Sovetoj, la bolŝevikoj -kune kun aliaj revoluciuloj- voĉdonis la nuligon de la mortpunon. Nun la sistemo uzata de la Ĉeko estas tiu de la reprezalioj, aprobita de komunista sanktulo kaj sankciita de la komunista ŝtato.

5-a ARTIKOLO: MEMOROJ PRI KROPOTKIN

Vizito al la granda reformisto

Inter tiuj, kiujn mi deziris vidi, kiam mi alvenis al Rusujo en Januaro 1920, estis Pedro Alexeivitch Kropotkin. Mi tuj eksciis kiel lin trovi. Oni informis min, ke la sola rimedo estos kiam mi iros al Moskvo, ĉar Kropotkin loĝis en *Dimitrov*, malgranda vilaĝeto ĉirkaŭ 60 verstojn distance de la urbo. Ĉar la lando estis tiom detruita de la milito, mi ne havis alian solvon, ke atendi okazon por iri al Moskvo, sed feliĉe baldaŭ mi ĝin kaptis.

Komence de Marto pluraj eminentaj komunistoj iris al Moskvo, inter ili Radek kaj Gorky, kaj permesis al mi veturi per la sama aŭtomobilo. Alveninte Moskvon, mi klopodis por trovi rimedojn iri al *Dimitrov*, sed mi ree renkontis malhel-pojn.

Mi eksciis, ke estis preskaŭ neeble vojaĝi. La tifo apogeis kaj la fervojaj stacidomoj estis plenplenaj de homoj atendantaj trajnojn dum kompletaj semajnoj. Kiam trajno aperis, komenziĝis kruela lukto por la posedo de colo da spaco en la vagonoj.

Kvincent homoj amasiĝis en vagono, kiu havis spacon nur por kvindek. Malsataj kaj lacaj ili suprengrimpis sur la tegmenton de la vagonoj ne zorgante pri la intensa malvarmo nek pri la faldanĝeroj, ne okazis vojaĝo en kiu ne estis pluraj viktimoj, kiuj pereis frostigitaj. Mi estis senkuraĝigita, ĉar mi aŭdis, ke Kropotkin malsanas kaj, mi timis, ke li ne vivos ĝis la printempo; mi ne kuraĝis peti specialan aŭtomobilon, ankaŭ ne mi povis amasigi sufiĉe da energio por vojaĝi laŭ la ordinara maniero. Neatendita cirkonstanco okazis por eligi min el la dilemo. La eldonisto de la ĵurnalo *Herald* de Londono, akompanata de unu el liaj korespondantoj, an-

taŭiĝis al mi en Moskvon. Ili ankaŭ volis viziti Kropotkin-on, kaj oni al ili disponigis specialan aŭton. Kune kun Alejandro Berkman kaj A. Shapiro mi povis aliĝi al s-ro Lansbury kaj sendanĝere veturi.

La kampodomo de Kropotkin estis lokita malantaŭ ĝardeno je malmulta distanco de la strato; en la nokta mallumo oni nur rimarkis la maldiafanan lumon de petrollampo, kiu lumigis la vojon al la domo. Poste mi eksciis, ke la petrolo malabundis ĉe Kropotkin kaj, ke necesis ĝin ŝpari. Post kiam Pedro faris sian ĉiutagan laboron, la sama lampo devis esti uzata en la ĉambro, kie la familio kunvenis nokte. Ni estis tre bone akceptitaj de Sofia Kropotkin kaj ŝia filino, kiuj kondukis nin al la ĉambro, kie estis la granda viro.

La lasta fojo, kiam mi vidis lin, estis en 1907 en Parizo post la Anarĥiista Kongreso de Amsterdamo. Kropotkin, al kiu oni malpermesis la eniron en Francujon dum multaj jaroj, ĵus ricevis permeson reveni. Tiam li jam aĝis sesdek kvin jarojn, sed li ŝajnis tiel vivplena kaj ankoraŭ estis tiel vigla, ke li ŝajnis multe pli juna.

Estis granda inspiro por ĉiuj ni, kiuj havis la bonŝancon iam kontakti lin. Neniu povis tiam kredi, ke Pedro Alexeivitch estis maljuna, sed tio ne okazis tiel en Marto 1920. Mi min surprizis pro lia transformiĝo, li estis maldikigita, elĉerpita. Li nin ricevis per sia karakteriza ĉarmo. De la komenco ni komprenis, ke nia vizito ne povos esti kontentiga; Pedro ne povis sincere paroli ĉeeste de du nekonatoj kaj plie se ili estis korespondantoj. Post horo da ĝenerala konversacio, ni petegis al la edzino de Kropotkin kaj al Sasha, ke ili distru la anglajn vizitantojn dum ni parolis en la rusa kun Kropotkin. Krom mia intereso pri lia sano, mi ankaŭ tre deziris ricevi de li iom da lumo pri aferoj de graveco, kiuj jam komencis ĝeni mian menson, la rilato de la bolŝevikoj al la revolucio; la despotaj metodoj, kiuj, laŭ oni certigis al mi, estis truditaj de

la interveno kaj la blokado al la regantoj. Kion Kropotkin pensis pri tio kaj, kiel li klarigos sian longan silentadon?

Mi faris nenian noton pri nia interparolo kaj nur donos ĝian esencon. Ĝi temis pri tio, ke la Rusa Revolucio levis la popolon je granda alteco kaj pavimis la vojon al grandaj sociaj ŝanĝoj. Se tiam oni permesus al la popolo uzi siajn energiojn, Rusujo nun ne estus en tiel ruinigita situacio.

La bolŝevikoj, kiuj estis puŝitaj antaŭen de la revolucia ondo, komence atentis la revoluciajn kantojn de la popolo, kaj tiel gajnis la fidon de la homamasoj kaj la helpon de la revoluciaj militistoj.

Komence de Oktobro la bolŝevikoj komencis subigi la intereson de la revolucio al la konstruado de la diktatoreco, kaj ĉi tio paralizis ĉian socian agadon. Kropotkin parolis pri la kooperativo, kiel la ĉefa rimedo, kiu laŭ lia opinio povus kunigi la interesojn de la kamparano kun tiuj de la laboristoj. Sed ĉi tiuj kooperativoj estis la unuaj, kiujn oni detruis. Li varme parolis pri la senkuraĝigo, persekutado kaj kruela gvatado de ĉia politika ombro aŭ opinio, kaj eldiris multajn ekzemplojn de la mizero kaj suferoj de la popolo. Ĉefe li tre emfaze sin deklaris kontraŭ la Bolŝevika Registaro, ĉar ĝi tiel senkreditigis la Socialismon kaj la Komunismon antaŭ la rusa popolo.

LA KIALOJ DE LIA SILENTO

Kial do li ne levis sian voĉon kontraŭ ĉi tiuj malbonoj, kontraŭ la maŝino, kiu estis elsuĉanta la sangon kaj la vivon de la revolucio? Du kialojn prezentis Kropotkin.

La unua, ĉar estis malpermesita en Rusujo la esprimo de opinioj, la dua, ĉar li ne volis malhelpi la marŝon de la Bolŝevika Registaro, kiam ĝi estis atakita de la kombinitaj imperiismaj fortoj de Eŭropo, kaj la virinoj kaj infanoj mortis pro malsato kaŭze de la krima blokado, sekve li ne povis

partopreni en la krioj de la eksrevoluciuloj de "KRUCUMU ILIN". Li preferis silenti almenaŭ estantece.

Kaj krome protesti kontraŭ la registaro estis tute senutila. La registaro devis subteni sian potencon ĉiakoste kaj, sekve ne povis perdiĝi en konsideroj.

Kaj poste li aldonis:

«Mi opinias, ke ni ĉiam klopodis por komprenigi al la homamasoj tion, kio estas la marksismo. Kial ni nin surprizas nun?»

Mi demandis lin, ĉu li faris notojn pri siaj impresoj kaj observoj. Tutcerte li devis konstati la gravecon de tiaj informoj por siaj kamaradoj, por la laboristoj, konklude por la tuta mondo. Kropotkin momente min rigardis kaj poste diris:

«Ne, mi ne skribas, neblas skribi, kiam oni troviĝas inter tiom da sufero, kiam ĉiu pasanta horo alportas novajn novaĵojn pri mizero, kiun oni ne povas malpezigi. Krome ĉiu persona sekreto kaj sekureco malaperis.

Ĉiumomente povas okazi sturmo, la Ĉoko venas nokte, traserĉas ĉiujn domangulojn, renversas ĉion kaj kunportas kun ĝi eĉ la lastan papereron. En tia konstanta streĉiĝo maleblas gardi iun informon. Sed super ĉiuj ĉi konsideroj, estas mia libro pri etiko, mi laboras nur kelkajn horojn ĉiutage kaj ankoraŭ restas multo farota».

Ni jam monopoligis nian kamaradon longtempe kaj, malgraŭ ke ankoraŭ restis multaj temoj parolotaj, ni devis nin kontentigi per tiu punkto. La konversacio ree iĝis ĝenerala, sed tro malfruiĝis kaj nia amiko jam laciĝis, tial ni tuj adiaŭis. Ni interkonsentis reveni en la printempo, kiam ni havos pli da tempo por konversacii.

Post varma brakumo, kutimo de Kropotkin al ĉiuj, kiujn li amis, ni iris al nia aŭto. Mia koro sentis sin peza pensante

pri la granda Rusujo, mia spirito estis konfuzita de tio, kion mi aŭdis. Ankaŭ min alarmis la fizika stato, en kiu troviĝis la kamarado. Mi timis, ke li ne postvivos ĝis la printempo. La vintro de 1920 estis tre terura, la homoj mortis pro malsato, tifo kaj malvarmo, kaj la penso pri tio, ke Kropotkin povus iri en la tombon sen tio, ke la mondo scius, kion li opinias pri la rusa revolucio, estus terura. Mi min sentis senpacienca. Kropotkin kuraĝis kontraŭstari la tutan despotismon de la caroj. Kial li ne povis skribi nun? Sed poste mi ekkomprenis, kial Kropotkin ne povis skribi pri la nuntempaj okazaĵoj de Rusujo. En Julio 1920, mi revenis al Moskvo, estis kun la ekspedicio de la Muzeo de la Revolucio survoje al Ukrainujo. Iun tagon Sasha Kropotkin venis min vidi. Ŝi akiris aŭton de registara oficialulo, kaj deziris, ke Aleksandro Berkman kaj mi iru al *Dimitrov*. Ni ekveturis la sekvan tagon kaj alvenis al *Dimitrov* post malmultaj horoj. La ĝardeno ĉirkaŭanta la domon de Kropotkin floris kaj la foliaro kovris la domon. Kropotkin estis siestinta, sed ellitiĝis tuj kiam li nin aŭdis kaj kuniĝis kun ni. Li multe pliboniĝis, estis plena de energio kaj vivo.

Li tuj nin kondukis al la legomĝardeno, kiu estis prilaborita preskaŭ ekskluzive de Sofía Kropotkin, fiero de Pedro Kropotkin kaj la ĉefa provizantino de la familio. Li fieris montrante al ni novan specon de laktuko ellaborita de Sofía. Kropotkin gaje nin invitis manĝi. La printempo faris miraklojn en li. Estis jam alia viro.

La unuaj sep monatoj de mia restado en Rusujo preskaŭ min konsumis. Mi venis kun tiom da entuziasmo, kun tiom da deziro min fordoni al la laboro, al la sankta defendo de la revolucio, ke tio, kion mi vidis, tute min senkuraĝigis. Mi povis fari nenion. La rado de la Socialisma Ŝtato min renversis paralizante miajn energiojn. La suferoj kaj malfeliĉoj de la popolo, la forgeso de ĝiaj bezonoj, la persekutado kaj sub-

premo konfuzis mian menson kaj la vivo al mi iĝis neeltenebla.

Ĉu estis la revolucio, kiu transformis la idealistojn en purajn bestojn? Se tio estis tiel, sekve la bolŝevikoj estis nenio pli ol ŝakpeonoj en manoj de la neeviteblaĵo. Aŭ ĉu estus la nesentema karaktero de la ŝtato, kiu per malbonaj ruzaĵoj jungis la revolucion al sia ĉaro, kaj nun transformis ĝin en rimedojn bezonajn por la ŝtato? Mi ne povis respondi ĉi tiujn demandojn, almenaŭ en 1920. Kiu scias, ĉu Kropotkin povintus.

6-a ARTIKOLO: LASTA INTERVIDIĜO KUN KROPOTKIN

Liaj suferoj en Rusujo kaj la persekutado, kiun li suferis. Preskaŭ blinda pro manko de lumo. Lia morto.

Mia dua vizito al Kropotkin daŭris unu horon. Dum tiu tempo Pedro detale parolis pri la Rusa Revolucio, la parto efektivigita de la bolŝevikoj, la leciono donita al la anarĥiistoj aparte kaj al la mondo ĝenerale. Li konsideris, ke la rusa revolucio estas pli granda laŭ principoj kaj celoj ol la franca revolucio, ĉar malgraŭ ke la popolo ne estis tiom progresinta, pli adaptiĝis al la konceptoj de la nova vivo. La spirito de la homamasoj dum la revolucioj de Februaro kaj Oktobro pruvis, ke ili komprenis la grandajn ŝanĝojn, kiuj atendis ilian kunajn penadojn, kaj ili estis pretaj tute sin engaĝi en la afero.

La popolo sciis, ke ĝi havis antaŭ si ion grandegan, kiun ĝi devis alfronti, organizi kaj direkti. Tiu spirito, hodiaŭ katenita de la malsato kaj la persekutado, ankoraŭ estas konstatebla. La plej bona pruvo pri tio estas la rezisto, kiun la rusa popolo prezentas al la bolŝevika jugo. La bolŝevikoj, dum sia marŝo al la potenco, tre malproksimiĝis de sia rolo de avangardo de la revolucio, kiel ili asertas esti. Male ili estis la kluzpordo, kiu haltigis la leviĝantan tajdon de la energioj de la popolo.

Pro ilia fiksa ideo pri tio, ke nur diktatoreco povas direkti kaj protekti la revolucion, ili fortigis sian grandegan Ŝtaton, kiu estas detruanta la revolucion. Kiel marksistoj, ili neniam konsciis nek konscios, ke la sola protekto de la revolucio dependas de la kapablo de la popolo organizi sian ekonomian vivon. Cetere Kropotkin aldonis, ke li prezentis sian vid-

punkton pri la rusa revolucio per sia letero al la laboristoj de Eŭropo, kiu laŭ mia opinio estis vaste publikigita.

Kropotkin ankaŭ parolis pri la partopreno, kiun la anarĥiistoj havis en la revolucio; li parolis pri la morto de iuj, la heroa lukto de multaj kaj la nerespondeco de kelkaj. Ĉefe li asertis la bezonon, ke ĉiuj anarĥiistoj estu pli bone ekipitaj por la rekonstrua laboro dum la revolucio.

Mi klare memoras siajn proprajn vortojn:

«Ni, la anarĥiistoj, multe parolis pri la socia revolucio. Sed kiom da ili faris al si la penon sin prepari por la laboro dum kaj post la revolucio? La rusa revolucio pruvis la imperativan bezonon de tia preparado por praktika kaj konstrua laboro».

En letero adresita al unu el siaj plej intimaj amikoj, Kropotkin diris, ke li fine konsideris la sindikatismon, kiel la ekonomian bazon de la anarĥiismo, tio estas, la rimedon por la ekonomia organizado kaj la esprimon de la energioj de la popolo dum la revolucia periodo.

Estis memorinda tago!, la lasta, kiun mi pasigos kun la granda viro. Kiam mi estis vokita por lin flegi dum lia lasta malsano, alvenis al *Dimitrov* unu horon post lia morto. La kutimaj burokrataj konfuzo, nekompetenteco kaj prokrasto rabis al mi la okazon oferi al Kropotkin ian servon, kiel pagon por la multa bono, kiun li faris al mi.

Du aferoj vekis mian intereson en Kropotkin dum ambaŭ vizitoj: la manko de malbonvolo kontraŭ la bolŝevikoj kaj la fakto, ke li ne menciis siajn proprajn suferojn kaj senhavecon. Estis post lia morto, kiam mi eksciis kelkajn detalojn pri lia vivo sub la bolŝevika reĝimo. Komence de la jaro 1918 Kropotkin grupigis ĉirkaŭ si kelkajn el la plej lertaj specialistoj pri diversaj branĉoj de la politika ekonomio. Lia celo estis fari ĝisfundan studon pri la ekonomiaj resursoj de Rusujo,

kompili tiujn resursojn en monografioj por ke ili povu servi kiel praktika helpo al la rusa rekonstruado.

Kropotkin estis la ĉefeldonisto de ĉi tiu entrepreno. Oni preparis volumon, sed ĝi ne publikiĝis. Ĉi tiu scienca grupo estis konata per la nomo de la Federaciisma Ligo, estis detruita de la registaro kaj ĉiu materialo konfiskita. La ĉambroj de Kropotkin dufoje estis konfiskitaj kaj lia familio estis devigita serĉi alian loĝejon. Post ĉi tiuj grandaj ĝenoj estis kiam Kropotkin transloĝiĝis al *Dimitrov*, kie li restis en nevola ekzilo. Eĉ somere estis tre malfacile lin viziti, ĉar oni bezonis specialan permeson por vojaĝi, kaj ĝin akiri postulis multe da tempo kaj penado, kaj vintre tio iĝis preskaŭ neeble. Tiel okazis, ke tiu, kiu kunvenigis ĉe si la plej bonajn pensulojn kaj ideojn el la tuta mondo, nun estis devigita al enfermiteca vivo.

Liaj ununuraj vizitantoj estis malriĉaj kamparanoj, ne tre inteligentaj laboristoj de lia vilaĝeto, kiuj venis al li kun siaj ĉiutagaj malfeliĉoj. Mi rememoras, ke dum la nokto de nia vizito, Kropotkin ricevis leteron de amiko en Moskvo, sciencisto, kiu loĝis kun sia edzino kaj du infanoj en unu ĉambro. Nur lampo lumigis la tablon, sur kiu la infanoj studis la lecionojn: la edzino kopiis kelkajn manuskriptojn, dum li uzis angulon por efektiviĝi siajn kemiajn laborojn. Li estis dungita en loko distance de dek du verstoj de sia domo kaj ĉiutage devis piediri tiun distancon. Kropotkin, kiu per multnombraj ĉiulingvaj publikaĵoj, estis en konstanta komunikado kun la tuta mondo, nun estis tute izolita for de tiu vivrimedo.

Li eĉ ne povis ekscii tion okazanta en Moskvo kaj Petrogrado.

Liaj solaj fontoj de novaĵoj estis la du registaraj gazetoj: *Pravda* kaj *Izvestia*. Dum li loĝis en *Dimitrov*, lia laboro pri etiko estis malhelpita. Li ne povis akiri la bezonajn sciencajn librojn. Resume Kropotkin suferis mensan malsaton, kiu

sendube lin turmentis multe pli ol la fizika subnutrado. Li ricevis pli bonan "*peyok*"-on aŭ porciumon ol la plejmulto, sed ĉi tio eĉ ne sufiĉis por konservi sian vivecon.

Bonsanĉe Kropotkin de tempo al tempo ricevis helpon de siaj eksterlandaj kamaradoj kaj ankaŭ de tiuj de Ukrainujo, kiuj ofte sendis al li manĝaĵojn.

Li ankaŭ ricevis similajn donacojn de Makhno, tiam akklamita de la bolŝevikoj, kiel la teruro de la kontraŭrevoluciaj fortoj en la suda Rusujo. Sed la plej rimarkinda manko estis tiu de brulaĵoj kaj lumo. Kiam mi vizitis la familion Kropotkin en 1920, ili sin konsideris tre bonŝancaj disponante lumigon en pli ol unu ĉambro. Dum parto de 1918 kaj la tuta 1919, Kropotkin verkis sian Etikon sub la malfortaj radioj de oleolampo, kio preskaŭ lin blindigis porĉiame. Dum la mallongaj horoj de la tago, li transskribis siajn signojn per skribmaŝino, malrapide kaj per dolora tajpado en ĉiu litero. Tamen ne estis liaj propraj suferoj, kiuj malpliigis liajn fortojn. Estis Rusujo, la suferoj de tiuj lin ĉirkaŭantaj, la forigo de ĉiu penso, la persekutado kaj malliberigo de kiuj havis opinion, la senfinaj malbonagoj faritaj al la popolo, kio igis el liaj lastaj jaroj la plej profundan tragedion.

Se li povintus fari ion por mildigi la suferojn, por venigi la diktatorojn de Rusujo al siaj propraj sentoj... sed ne, li ne povis. Li neniel povis, kiel faris kelkaj el la malnova revolucia gvardio, partianiĝi al la malamikoj de la revolucio. Kaj kvankam li trovus manieron publikigi sian proteston en la eŭropa gazetaro, la reakciuloj ĝin uzus kontraŭ Rusujo. Ne, li ne povis fari tion kaj tre bone sciis, ke estas senutile protesti kontraŭ la bolŝevika registaro.

Tamen lia angoro estis tiel granda, ke dufoje Pedro Kropotkin turnis sin al surdaj oreloj. Unuafoje por protesti kontraŭ la terura kutimo de la reprezalioj, la alia kontraŭ la komplete forigo de publikaĵoj ne apartenantaj al la ŝtato.

Ekde la Ĉoko komencis sian malluman ekziston, la bolŝevika registaro sankciis la sistemon de la teroro. Patrinoj, maljunaj kaj junaj, patroj, fratoj, kaj eĉ infanoj estis viktimoj de reprezalioj, multfoje pro kialoj aŭ ofendoj fare de unu el iliaj familianoj, pri kiuj ili eĉ ne eksciis.

Aŭtune de 1920, la menŝevikoj enmigrintaj en Eŭropon minacis per la reprezalio se la subpremo kontraŭ iliaj kamaradoj daŭros. La bolŝevika registaro anoncis en la oficiala gazetaro, ke kontraŭ ĉiu pereonta komunisto, pereos dek menŝevikoj. Estis tiam, kiam la famaj revoluciuloj Vera N. Figner kaj Pedro Kropotkin sendis sian proteston al la potencoj, dirante, ke la kutimo de reprezalio estis makulo por la rusa revolucio, drako, kiu lasis terurajn rezultojn post sia paso, ke la estonteco neniam pardonos tiel barbarajn metodojn. La dua protesto okazis reage al la atako fare de la registaro por "likvidi" ĉiujn eldonejojn, ĉu politikajn, kooperativajn aŭ privatajn. Ĉi tiu protesto estis direktita al la Tutrusa Kongreso de ĉiuj Sovetoj. Estas interese rimarki, ke Gorky mem, oficialulo de la Komisararo pri Instruado, preskaŭ samtempe sendis similan proteston de Petrogrado.

Kropotkin, en siaj deklaroj, menciis la danĝeron de tia atako kontraŭ la progreso kaj, eĉ pli, kontraŭ ĉiu penso. Tia ŝtata monopolo super la penso nebligis ĉian kreon laboron. La rusa situacio dum la lastaj kvar monatoj havigas konvinkan pruvon pri tio.

Unu el la elstaraj karakterizaĵoj de Kropotkin estis lia diskretemo koncerne sin mem. Dum mia tridekseshora restado en *Dimitrov* antaŭ la kadavro, mi pli eksciis pri lia persona vivo ol dum tiom da jaroj de kiam mi konatiĝis kun li. Eĉ inter la amikoj de lia propra rondo estis tre malmultaj sciantaj, ke Kropotkin, krom artisto, estis muzikisto kun konsiderinda talento. Inter liaj havaĵoj, mi trovis kompletan kolekton de liaj meritegaj desegnaĵoj. Li pasie amis la muzikon kaj estis tre

lerta muzikisto, pasigis sian libertempon sidante ĉe la piano, kie li sendube trovis trankvilecon kaj pacon ludante la majstrojn per profunda sento.

Lia kadavro metita sur la skribotablo ŝajnis dormi la sonĝon de la paco, kaj lia vizaĝo konserviĝis tiel afabla, kiel kiam li vivis. Tie ripozis la granda filo de Rusujo. Kiu dum luktoj kaj mankoj ĉiam restis lojala al la revolucio kaj ne volis ĝin forlasi. Li ne vivis por vidi la kapitalismon en Rusujo starigitan, kiel monumenton, sur la tombo de la revolucio. Sed eĉ tio neniam senigus lin je lia fervora fido je la reviviĝo de la popolo, la fina triumfo de liberecana revolucio.

7-a ARTIKOLO: LA SINDIKATOJ

La sindikatoj de la rusaj laboristoj estas submetataj al la bolŝevika diktatoreco

La sindikatoj de Rusujo, kvankam junaj, ĉar ili estiĝis en 1905, estis tre aktivaj organizaĵoj. Ili devis esti tiel por povi kontraŭstari la persekutadojn de la Caro, kaj malgraŭ ke tiam ili devis kaŝe labori, tamen ili estis tre grava faktoro en la ekonomia lukto de la rusa laboristo. Ĉi tiu fakto estis pruvita per la forto nelonge post la revolucio de Februaro. La sindikatoj, trempitaj de la nova spirito naskiĝinta en Rusujo, jam ne sin kontentis nur per politikaj ŝanĝoj. Ilia ideo estis, ke la laboristoj ekposedos la ekonomian konstruadon de la lando, por kio ili organizis komitatojn de metiejo por la regado de la industria vivo. Resume la Sindikatoj jam estis, pli frue ol la bolŝevika reĝimo, la organizita esprimo de la postuloj kaj aspiroj de la laboristoj. Kaj pro tio, la tria konferenco de la sindikatoj okazinta en Petrogrado en Julio 1917 jam sendis 210 delegitojn reprezentantajn 1.475.425 membrojn.

La enpotenciĝo de la Diktatoreco de la Proletaro tuj sentiĝis en la Sindikatoj. La aliĝo al laboristaj organizaĵoj fariĝis deviga kaj ĉiu laboranta estis aŭtomate registrita en la Sindikato kaj devigita pagi, ĉu plaĉos al li aŭ ne. La kvoto de la 3 procento estis deprenita de lia salajro, kaj tiel la rusa laboristo devis subteni la samajn organizaĵojn, kiuj detruis ĉiun simpton de iniciato kaj memmastrumado en la rusaj Sindikatoj.

La tutrusa soveto

La Tutrusa Sindikata Soveto konsistas el 120 membroj. La centran plenuman komitaton konsistigas dek unu membroj kaj preskaŭ ĉiuj devas esti komunistoj por esti elektitaj al ĉi tiu institucio. La rezultato estas, ke la Sindikatoj fine iĝis

nura branĉo de la ŝtata maŝinaro, tute kontrolata kaj direktata de ĝi. La ordinara membro ne havas voĉon nek voĉdonon koncerne la aktivecojn de la organizaĵo, ankaŭ ne okazas regulaj kunvenoj krom tiuj, kiujn superregas la bolŝevika frakcio.

Se iu el la sindikatoj kuraĝas efektivigi la funkciojn de reala sindikato, oni tuj al ĝi komprenigas, ke ne gravas tio, kion faras la sindikatoj de Okcidenta Eŭropo aŭ Usono, ke la komunistaj sindikatoj devas obei la leĝon kaj teni la buŝon fermita. Kiel ekzemplo, la bakistoj de Moskvo strikis en 1920 petante pliigon de la porciumo da pano. La registaro ne multe zorgis pri la afero. Ĝi simple malfondis la sindikaton, forpelis la bandestrojn kaj kelkaj el la plej aktivaj membroj estis arestitaj. Al la plej elstaraj oratoroj el la sindikato oni malpermesis partopreni en la sindikatkunvenoj kaj uzi iliajn rajtojn.

La sama taktiko estis uzata en aliaj strikoj; interesa okazaĵo rilate tion estis tiu de la tipografoj de Moskvo; tiuokaze ne temis pri striko; estis nur la "senprudentaĵo" okazigi kunvenon, al kiu oni invitis membrojn de la laborista komisiono de Britujo.

En tiu asembleo, Chernoff, estro de la Sociaj Revoluciuloj kaj Dan, eminenta menŝeviko, faris la nepardoneblan pekon rakonti al la britaj laboristoj kelkajn faktojn pri la sindikatoj kaj la situacio de la laboristo en Rusujo. Tuj post tio oni eksigis ĉiujn oficialulojn de la sindikato de tipografoj kaj kelkaj el ili estis enkarcerigitaj. En ĉiuj oficialaj gazetoj de la lando oni karakterizis la tipografojn, kiel kontraŭrevoluciulojn kaj perfidulojn, kaj ilin denunciis per tiel severaj vortoj, ke tio servis por teruri la reston de la landproletaro.

La tiraneco efektivigita super la sindikatoj estas tiel detrua, ke la plej sensignifa protesto estas karakterizita kiel manko de disciplino kaj krimo kontraŭ la revolucio. Dum la strikoj de Petrogrado en 1921, kiam la laboristoj de la metie-

jo *Baltic* protestis kontraŭ la aresto de dudek du el ĝiaj membroj, Antselovitch, prezidanto de la Sindikatoj de Petrogrado, al ili diris, ke ĉiuj apartenis al la Ĉoko kaj kelkajn tagojn poste okazis sturmo kontraŭ la metiejoj, kio rezultigis la malliberigon de multaj laboristoj. Resume la Sindikatoj en la bolŝevika Rusujo estis tute superregitaj de la ŝtato kaj ne havas aliajn funkciojn ol fari policajn laborojn por ĝi.

Kompreneble tia situacio ne povas longe daŭri ne kaŭzante la malkontenton de la laboristoj, kaj en 1920, la malkontento atingis tian ekstremon, ke ĝi minacis la registaron kaj ĉi tiu estis devigita serioze konsideri la situacion.

Fine de 1920 oni pristudis la funkciojn de la sindikatoj kaj baldaŭ evidentiĝis, ke eĉ ene de la komunista partio ekzistis diversaj opinioj pri ĉi tiu grava demando.

Ĉiuj komunistestroj partoprenis en la diskuto, kiu decidis la sorton de la Sindikatoj. La prezentitaj tezoj malkovris kvar ĉefajn tendencojn. Unue la frakcio de Lenino-Zinovjev, kiu subtenis, ke la «Sindikatoj havas nur unu funkcion sub la diktatoreco de la proletaro», tio estas, servi kiel lernejoj de la Komunismo.

La dua tendenco estis reprezentita de Rasanoff kaj liaj partianoj, kiuj insistis, ke la Sindikatoj devas daŭre funkcii kiel la forumo de la laboristoj kaj, kiel iliaj ekonomiaj protektantoj.

La tria frakcio estis tiu de Trockij, la milita geniulo, kiu nur povas pensi laŭ militistaj terminoj. Li prezentis la tezon, ke la sindikatoj fariĝos administrantoj kaj kontrolistoj de la industrioj, sed ke nuntempe la administrantaro de la sindikatoj devas esti nomumita de militistaj metodoj.

La lasta kaj plej grava estis la laborista opozicio, gvidita de s-ino Kollantay kaj Schilapnikoff, kiu vere prezentis la senton de la laboristoj kaj estis apogata de ili.

Ribelo de Opozicio

Ĉi tiu opozicio insistis, ke la nuligo de la Sindikatoj detruis la intereson de la laboristoj pri la ekonomia rekonstruado de la lando kaj, ke ĝi paralizis la kapablon de produktado. Ili petis la liberigon de la homamasoj je la jugo de la burokrata ŝtato kaj ties koruptaj funkciuloj kaj, ke oni donu al la popolo la okazon efektiviĝi ĝiajn kreajn energiojn. Ili menciis, ke en la revolucio de Oktobro oni luktis por ke la homamasoj povu administri la industrian vivon de la lando; resume la laborista Opozicio eĥis la proteston de la amasigita malkontento de la plejmulto.

Estis reala batalo inter Trockij kaj Zinovjev. En Petrogrado la influo de Zinovjev estis tiel potenca, ke Trockij devis lukti por akiri permeson por paroli en la komunistejo pri la disputo. Trockij kreis tian impreson, ke li preskaŭ ruinigis la Komunistan partion.

Sed Dio amas Leninon. Ĉiam, kiam lia strukturo komenĝas ŝanceliĝi, la Plejpotenculo al li sendas subtenon. Kaj la granda laborista maltrankvileco kaj la multnombraj strikoj de Februaro 1921 kaj la ribelo de Kronŝtadto pli-malpli estis tiu subteno. La komunistan unuiĝon endis teni ĉiakoste. Kaj tiel la paĉjo alvokis siajn filetojn unu post alia, kaj al ili donis lecionon. Lenino priskribis la laboristan opozicion kiel anarĥisindikatisman, mezklasan ideologion, kaj sekve li ordonis ĝian neniigon. Lenino karakterizis Schliapnikoff-on, unu el la plej influaj de la opozicio, kiel "ĝenan komisaron" kaj oni lin silentigis igante lin membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio. Al s-ino Kollantay oni diris, ke ŝi silentu aŭ, ke ŝi forlasu la partion, kaj ŝia broŝuro –elmetante la opiniojn de la Opozicio- estis forigita.

Al kelkaj el la malgrandaj geniuloj de la Opozicio oni donis feriojn ĉe la Ĉoko, kaj eĉ Riasanoff -maljuna kaj fidinda komunisto- estis eksigita dum ses monatoj je siaj aktivecoj

en la sindikatoj. Koncerne Trockij-on, kiun Lenino kondukis al la malestimo de la partio, kaj lin karakterizis kiel "sensci-an pri la fundamenta Marksismo", li estis sendita al Kronŝtadto por tie alporti la "pacon de Varsovio". Lenino kaj lia justa sanktulo Zinovjev atingis venkon. La Sindikatoj restis kiel lernejoj de la Komunismo.

La nova ekonomia politiko rapide formiĝas. La Sindikatoj estas la unuaj, kiuj sentas sian efikon. Dum asembleo de la Centra Komitato de la Komunista Partio okazinta en Moskvo en Decembro 1921, oni diskutis la funkciojn de la Sindikatoj. Estis nomumita komisiono konsistigita de Lenino, Radzyutak kaj Andreye, por elekti kaj prepari la tezon pri la temo. Poste ĉi tiu tezo estis unuanime akceptita de la Tutrusa Centra Soveto de ĉiuj Sindikatoj. Inter aliaj aferoj la tezo enhavas la jenon:

«1.- La deviga aliĝo de la laboristoj al la laboristaj organizaĵoj rezultigis la burokratan difekton de la Sindikatoj, kio ilin malamikigis al la homamasoj (multaj laboristoj, kiuj diris la samon, estis denuncitaj kiel kontraŭrevoluciuloj kaj senditaj al la Ĉoko): sekve necesas starigi la propravolan aliĝon al la sindikatoj.

2.- La laboristoj, kiuj aliĝos al la sindikatoj, ne devas esti ĝenataj de kaŭzoj de religio aŭ politikaj ideoj. (Ombroj de multnombraj viktimoj, kiuj estis batitaj pro iliaj politikaj ideoj diferencaj de tiuj de la bolŝevikismo!).

3.- La ekonomia rekonstruado de Rusujo bezonas la rigoran koncentriĝon de la potenco en la manoj de direktisto; sekve la laboristaj Sindikatoj ne devas pretendi la administradon de la industrioj luprenataj aŭ posedataj de privataj kapitalistoj».

Evidentas, ke la ekonomia politiko, subtenata de Lenino, malfermas la pordon al novaj laboristaj malfacilaĵoj kaj neeviteblaj konfliktoj. La solvo de ĉiuj konfliktoj, kiuj povus okazi

estontece, estos en manoj de "potenca institucio" kaj ekster la sindikatoj. La komisiono de Lenino jam indikis, ke ĉi tiu «alta aŭtoritato en deviga arbitracio de disputoj ne estos alia ol la Komunista Partio de la Tria Internacio». Evidentas, ke la Komunista Internacio signifas: konservi la superregadon de la rusa laborista movado, dum samtempe oni klopodas por atingi la regadon de la laboristaj organizaĵoj de Okcidenta Eŭropo kaj Usono.

Dume, la rusa laboristo, sub la nova ekonomia politiko, konstatas, ke lia situacio estas pli malbona ol antaŭ la komenco de la revolucio.

La okhora labortago, preskaŭ universala en Rusujo antaŭ kvar jaroj, estas nuligita. Laŭ la oficiala organo *Pravda* de Moskvo, en decembro 1921, la situacio estas la jena: el 695 industriaj establoj, nur 86 konservis la okhoran labortagon. En la plejmulto da la aliaj, la laboro daŭras naŭ horojn; en 44 establoj oni laboras de 10 ĝis 12 horoj; en 11, de 14 ĝis 16 horoj. Eĉ infanoj laboris en kelkaj lokoj de dek du ĝis dek kvar horoj.

La bakistoj estas la plej ekspluatataj kaj laboras pli da horoj, tio estas, de 12 ĝis 18 horoj. Ĉi tiu informo rilatas al Moskvo, la ĉefurbo de Rusujo. En provincoj ĝi estas eĉ multe pli malbona. En la ministaj distriktoj oni laboras de 16 ĝis 18 horoj.

En la ŝtataj fabrikoj de ledaĵoj en *Viteosk*, dek du horoj estas la normala labortago. En la fiŝkaptejoj de Astrakano, laŭ lokaj reprezentantoj en la dua tutrusa konferenco pri protekto de la laboro, labortago daŭras de 14 ĝis 16 horoj.

La rusa revolucio tamen ne estis tute vana. Ĝi forigis multajn antikvajn nociojn el la rusaj homamasoj, kaj la laboristo ne plu estas la obeema sklavo, kiu antaŭe estis. Li sin nutris per la friponaĵoj de la politiko, kaj ne plu kredas je ili. Nun,

kiam li povos miksiĝi kun siaj kunuloj en organizaĵoj, sendube li uzos pli rektajn rimedojn por konkeri sian postenon.

Lenino kaj lia bandaĉo antaŭflaras la danĝeron. Ilia atako kontraŭ la laborista kaj anarĥisindikata opozicio intense daŭras. Ĉu okazas, ke la anarĥisma stelo leviĝas en la Oriento?

Kiu ĝin scias! Rusujo estas la lasta el la mirakloj...

8-a ARTIKOLO: DEVIGA LABORO

La mensogo de la deviga laboro. Kiel kaj por kiuj oni faris la devigan laboron. Senkompetenteco de la regantoj.

La mobilizo de la laboro, fakte la labora rekrutigo, estis anoncita al la mondo, kiel la plej granda bono de la komunismo. «Ĉiuj devas labori hodiaŭ en Rusujo! Ne pli da parazitaj!» Kvankam Lenino neniam malkaŝe akceptis, ke ĉi tiu metodo, kiel multaj aliaj dekretitaj por rekonstrui Rusujon, estas eraro, tamen mi inklinas pensi, ke li opinias, ke la labora rekrutigo faris nenion por pliigi la "produktadon" de la laboristoj.

Kion ĝi atingis estis starigi, kiel ĝi ekzistis, la sklavan kaptitecon kaj anstataŭigi la parazitajn burĝaron per la maŝinaro de la bolŝevika parazitismo. Ĝia funkcio estis devigi la laboristojn labori ĝis la laciĝo, kontroli ilin en la laborpostenoj, arestigi kaj foje mortpafigi ilin pro forlaso de iliaj laborpostenoj. Kiel la plejmulto da la laboristoj, ili iris al la metiejoj ne por labori, sed por ripozi kaj sekrete fabriki kelkajn varojn, kiujn iliaj edzinoj kaj infanoj interŝanĝis en la kamparo kontraŭ faruno kaj terpomoj. Ĉi tio cetere savis ilin de la malsatmorto.

Koncerne la ŝancojn elporti ion el la kamparo, oni povus verki libron pri ĉi tiu temo. Kun la malpermeso de la komercovo venis la "*zagregaditelmy strjad*", la taĉmento da soldatoj kaj ĉoko-anoj en ĉiu stacidomo por konfiski ĉiujn varojn portitajn de privatuloj al la urbo. La malfeliĉuloj, kiuj post senlimaj malfacilaĵoj por akiri vojaĝpermeson, post tagoj kaj semajnoj da danĝero en la stacidomoj, post teruraj veturoj per malpuraj aŭ homplenaj vagonoj, aŭ sur la tegmentoj kaj

platformoj; ili alportis funton da faruno aŭ terpomoj, sed fine ili estis senigitaj je ĝi de la *stryad*.

Multokaze la materialo konfiskita estis dividita inter la defendantoj mem de la komunista ŝtato. La viktimoj estis bon-sortaj se ili eskapis sen pli grandaj ĝenoj. Ofte oni al ili rabis iliajn altvalorajn pakaĵojn kaj ili estis ĵetitaj en la malliberejon pro "spekulacio". La nombro de veraj spekulaciistoj arestitaj estis sensignifa kompare kun la amaso de missortuloj, kiuj plenigis la malliberejojn de Rusujo pro la klopodo por sin defendi kontraŭ la malsatmorto.

Oni povas diri ion pri la bolŝevikoj kaj tio estas, ke ili neniam lasis siajn aferojn duonfaritaj. Tuj kiam la deviga laboro fariĝis leĝo, ĝi estis efektivigita kiel venĝo. Viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj junuloj, apenaŭ vestitaj, kaj kun neprilaboritaj ŝuoj aŭ nur ĉifonoj je la piedoj, estis indiferente ĵetitaj al la malvarmo kaj la prujno por balai la neĝon aŭ tranĉi glacieron. De tempo al tempo ili estis pogrupe senditaj al la arbaro por tranĉi lignon.

Pleŭrito, pneŭmonito kaj tuberkulozo estis la rezultoj.

Estis nur tiam, kiam la stultuloj de la Kremlo kreis novan fakon por la distribuo de laboro. Ĉi tiu "buroo" decidis laŭ la fizikaj kapabloj de la laboristoj, ilin klasifikis kaj distribuis laŭ iliaj laboroj. Sub tiaj kondiĉoj, degenerantaj kaj sklavigantaj, ne maloftis, ke laboristoj faris malbonajn laborojn, ĉar ili malamis ĝin kaj la manieron per kiu oni ilin devigis labori. Ili komencis rigardi la Komunistan Ŝtaton, kiel novan hirudon, kiu elsuĉis la sangon de iliaj vivoj. La laboristoj de Petrogrado, la plej revoluciaj, kiuj subtenis la penadon de la longa lukto, kiuj defendis la urbon tiel heroe kontraŭ Judeniĉ, kiuj mortis pro malsato kaj malvarmo por la idealo, kiel mirinde!, ankaŭ komencis laŭdi la falsajn revoluciulojn kaj tute akordas kun ili pri ĉio.

Ne estas ilia kulpo, la kruela bolŝevika maŝino subfosis ilian fidon kaj idealojn. Tiu maŝino estigis kontraŭrevolucion senton, kiu daŭros tre longe malaperi.

Mi neniam forgesos scenon, kunsidon de la Soveto de Petrogrado. Tiun nokton oni devis decidi la sorton de Kronŝtadto. Post longaj paroladoj de la komunistaj gvidantoj, laboristo de la arsenaloj parolas. Fronte al la estrarejo kaj kun turnita dorso al la aŭskultantaro. Lia voĉo etendiĝas kun retenita emocio, liaj okuloj flamas, lia tuta figuro vibras. Li alparolas la prezidanton de la Soveto de Petrogrado, Zinovjev: «Antaŭ tri jaroj kaj duono, li diras, vi estis denunciata kiel germana spiono, perfidulo al la revolucio, atakita kaj persekutita. Ni, la laboristoj kaj maristoj de Petrogrado, savis kaj kondukis vin al la posteno, kiun vi nun okupas. Ni faris tion, ĉar ni esperis, ke vi estos la esprimo de la popolo. De tiam vi kaj via registaro disiĝis de ni. Nun de tie oni al ni krias insultajn nomojn, kuraĝas nomi nin kontraŭrevoluciuloj. Vi mortpafas kaj malliberigas nin, ĉar ni al vi petas, ke vi plenumu la promeson, kiun vi al ni faris en la revolucio de Oktobro».

Mi ne scias, kio okazis al ĉi tiu viro. Li povas esti malliberigita aŭ mortigita pro sia kuraĝo. Lia krio falis en surdajn orelojn. Tamen ĝi estis la krio de agonianta spirito, la spirito de la kolektiva Rusujo, kiu aspiris kaj atingis tian altecon en la revolucio kaj, kiu denove kuŝas katenita de la bolŝevika ŝtato.

9-a ARTIKOLO: LA PERSEKUTO DE MARIA SPIRIDONOVA

Ŝia torturita korpo, la spirito de Maria Spiridonova ankoraŭ vagas tra Rusujo.

La antaŭrevolucia Rusujo restas unika en la monda historio pro la granda nombro de virinoj, kiuj kontribuis al la revolucia movado. De la Decembristoj, kies edzinoj ilin sekvis, antaŭ preskaŭ jarcento, al la ekzilo, ĝis la lasta horo de la cara reĝimo, la rusa virino partoprenis en la plej heroaj aktivecoj kaj iris al la torturo kaj la morto kun la rideto surlippe. Inter la granda nombro de ili, unu el la plej ĉefaj gravulinoj, estas Maria Spiridonova.

Dum la periodo 1905-1906 ekzistis granda maltrankvileco inter la rusaj kamparanoj. En la provinco de *Tambov*, la kamparanoj, konsternitaj de la troa imposto kaj la brutaleco de la oficiroj, leviĝis kontraŭ siaj subpremantoj kaj ekbruligis kelkajn bienojn. La guberniestro de *Tambov*, Luzhenovsky, tre konata pro sia barbareco, plenigis la vilaĝojn per kozakoj, kiuj devigis la kamparanojn genuiĝi sur la neĝon duonnudajn, en tiu pozicio ili dumhore estis tenitaj, dum multaj el ili estis enliniigitaj kaj mortpafitaj. Maria Spiridonova estis tiam junulino, kaj tamen ŝi estis komisiita de sia partio, la Sociaj Revoluciuloj, mortigi Luzhenovsky-on, kiel puno al la barbareco trudita al la kamparanoj. Tio estis tre malfacila laboro. Luzhenovsky ĉiam estis bone gardata de siaj kozakoj. Li teruris la loĝantaron kaj prirabis al la kamparanoj eĉ iliajn lastajn provizaĵojn por daŭrigi la militon kontraŭ Japanujo. Sed ĉiuj ĉi malfacilaĵoj ne timigis Spiridonova-on. Alivestita kiel kamparanino, ŝi dediĉis sekvi Luzhenovsky-on. Ŝi aperis ĉe la fervojaj stacidomoj kaj sur ĉiuj vojoj, ĉiam "serĉante", kiel ŝi diris, "sian edzon, malaperintan soldaton". Mal-

graŭ la tuja danĝero kaj mankoj, ŝi ĉiam daŭre kaŝe observis la guberniestron ĝis fine venis la tiel dezirata okazo. Kiam la trajno, per kiu veturis Luzhenovsky, alvenis al la stacidomo, kie Spiridonova pacience atendis, kaj en la momento, kiam Luzhenovsky paŝis sur la kajon, ĉirkaŭita de siaj oficiroj, Maria rompis la kordonon de gvardianoj, kiuj apartigis ŝin, kaj lin mortigis per kugloj.

La rusaj caroj neniam estis partiaj pri la traktado de la politika virino. Ili sangavide persekutis virinojn same kiel virojn, sed en la afero de Maria Spiridonova, la satelitoj de la caro Nikolao eĉ superis la metodojn de Ivano la Terura. Ili ŝin submetis al nerakontebaj barbarecoj, ŝin trenis en la atendejon de la stacidomo kaj ŝin skurĝis ĝis ŝi svenis. Ili deŝiris ŝiajn vestojn kaj ŝin transdonis al la soldataĉaro. Ĉi tiuj sin distris bruligante ŝian nudan korpon per cigaredoj, piedbatis kaj fine seksperfortis ŝin. Plurajn semajnojn ŝi estis inter la vivo kaj la morto, kaj fine estis kondamnita al morto.

La novaĵo pri la torturo farita al Spiridonova teruris la mondon kaj levis protestojn, kiuj savis ŝin de la eŝafodo. Ŝi estis sendita kun kondamno de dumviva malliberigo al Siberio, kie ŝi alvenis -laŭ diras Gershun- kiel "amaso da viva karno". En la malliberejo ŝiaj kamaradoj ŝin traktis ameme, redonante al ŝi la vivon. Sed la terurega travivaĵo ŝin lasis tuberkuloza, kun senutila mano kaj perdo de okulo, sed ŝia spirito daŭre brulis.

La revolucio de Februaro malfermis la tombon al ĉiuj rusaj politikaj malliberigitoj, inter ili Maria Spiridonova. Kiu povos priskribi ŝian ĝojon, kiam ŝi ricevis la novaĵojn pri sia libereco? Kaj malgraŭ tio ŝi ne volis eliri el la malliberejo ĝis ŝi estis certa, ke ĉiuj politikaj malliberuloj eliros.

Inter granda aklamado de la popolo, Maria Spiridonova revenis al Rusujo, sed ne por loĝi en la vintra palaco, ne por festi kaj ripozi sur siaj laŭroj: ŝi revenis por sin ĵeti inter la li-

berigitaj energioj de la amasoj de kamparanoj, kiuj speciale ŝin respektis. Ŝi atingis la prezidantecon de la Plenuma Komitato de la Tutrusa Soveto de la kamparanaj reprezentantoj. De tiu posteno ŝi inspiris, organizis kaj direktis la vekitan spiriton kaj aktivecojn de la kamparanoj. Male al multaj aliaj, kiuj fekundigis la revolucion grundon dum pluraj jaroj per siaj larmoj kaj sango, sed malgraŭ tio ili ne komprenis la novan spiriton, Maria Spiridonova rapide rimarkis, ke la revolucio de Februaro estis nur la anonco de eĉ pli granda ŝanĝo.

Kiam la revolucio de Oktobro, kiu, kia renversanta lavango, envolvis multajn el la antaŭaj revolucioj, Spiridonova restis firma en sia revolucia fido kaj ĉe la popolo dum la plej kriza momento. Ŝi laboris tage kaj nokte je la servo de siaj amataj kamparanoj.

Ŝi estis la animo de la fako pri terkulturo kaj ellaboris planon por la socialigo de la tero, kiu estis unu el la plej gravaj tiamaj problemoj. Ŝia malforta korpo sin subtenis nur per ŝia granda volo en tiuj fatalaj tempoj.

En 1918 Maria Spiridonova jam konsciis, ke la revolucio estis en pli granda danĝero en manoj de ĝiaj amikoj ol en tiuj de ĝiaj malamikoj. La bolŝevikoj ĉion forbalais kaj enpotenciĝis per la frapfazoj parte kopiitaj el la anarĥiistoj kaj parte el la sociaj revolucioj, kaj baldaŭ sekvis alian vojon.

La unua paŝo estis la paco de Brest-Litovsk. Lenino insistis pri la konfirmo de tiu "pactraktato" nur por ke la revolucio vigliĝu, sed Maria Spiridonova, same kiel aliaj revolucioj el diversaj skoloj, por kiuj la revolucio ne estis nura laboratorio de politikaj eksperimentoj, decidis lukti kontraŭ la konfirmo. Ili subtenis, ke tia konfirmo estis perfido kontraŭ Ukrainujo, kiu tiam per granda entuziasmo repuŝis la germanan invadon de la suda parto de Rusujo; ili ankaŭ subtenis, ke tia konduto signifis la kompletan superregadon de la rusa popolo fare de la bolŝevika partio kaj la forigon de ĉiuj

ceteraj politikaj movadoj, kio kaŭzus la enlandan militon; ke la "ripozo" serĉita de Lenino estigus la ruinon de la revolucio.

Komenco de la suferado

Tiam Trockij kaj multaj aliaj komunistoj kontraŭstaris la pacon de Brest-Litovsk. Ili ankaŭ vidis la danĝeron, kiu ilin minacis, sed ili baldaŭ estis devigitaj al la akcepto pro la forta disciplino de la partio. Lenino gajnis la veton, kaj de tiam komenciĝis la suferado de la rusa revolucio.

Kiam mi estis en Usono, mi aŭdis konfuzajn rakontojn pri Maria Spiridonova en la Soveta Rusujo, sed tre baldaŭ post mia alveno mi estis informita de gravaj komunistoj, ke Maria estis malsana je la nervoj, malsano, kiu kondukis ŝin al la histerio, kaj tial ŝi estis akceptita en kuracdomo "por sia propra profito kaj, kie ŝi ricevadis tre bonan flegadon". Sed kiam mi mem intervidiĝis kun ŝi en Julio 1920, ŝi loĝis kontraŭleĝe en Moskvo en malgranda ĉambro, maskita kiel kamparanino, kiel dum la cartempo, ĉar ŝi eskapis el la "kuracdomo kaj el la bona flegado", kiu reale estis bolŝevika malliberejo. Mi trovis neniun spuron pri histerio en ŝi, sed male ŝi estis serena kaj pli firma ol ĉiuj, kiujn mi renkontis ĝis tiam en Rusujo. Dum du tagoj ŝi min ĉarmis per la rakonto pri la rusa revolucio, kaj pri kiel la sublimaj eblecoj de la popolo estis detruitaj de la maŝinaro de la Komunista Ŝtato. Estis rakonto de granda klareco kaj forto de konvinko.

Mi tiam eksciis, ke ŝi estis dufoje malliberigita de la bolŝevikoj; unuafoje post la morto de Mirbach⁵, kiam la bolŝevikoj fermis la kvinan Kongreson de la Soveto kaj arestis ĉiujn Sociajn Revoluciulojn de Maldekstro, kiuj estis gvidataj de Spiridonova.

5 NeT: Wilhelm von Mirbach Harff, germana diplomato, partoprenis en la intertraktadoj de Brest-Litovsk kaj estis nomumita ambasadoro de Germanujo en Rusujo. Li estis mortigita pro ordono de la Centra Komitato de la Socialista Partio de Maldekstro, kiu klopodis por instigi la daŭrigan de la milito inter Germanujo kaj Rusujo.

Liberigita post kvin monatoj, ŝi denove estis arestita fine de Januaro 1919 kaj enfermita en "kuracdomo", ne pro histerio aŭ mensa malforteco, sed ĉar ŝi ne lasis sin subaĉeti nek akceptis la tiel nomatan "Diktatorecon de la Proletaro". Ŝi sincere parolis al la popolo pri la danĝeroj, kiujn la nova bolŝevika politiko estigos, kaj la popolo ŝin aŭdis ĝoje. Spiridonova eldiris, ke la bolŝevikoj intencis vidigi al la mondo, ke la furioza persekutado kontraŭ la Sociaj Revoluciuloj de Maldekstro, kiu sekvis la ekzekuton de Mirbach, estis kaŭzita de supoza klopodo fare de ĉi tiuj por uzurpi la registaran potencon. Ŝi firme neis -kaj ŝiaj deklaroj estas subtenitaj de pruva materialo-, ke ŝia partio iam klopodis por uzurpi la komunistan potencon. La partio de Spiridonova konsideris la pacon de Brest-Litovsk, kiel perfidon kontraŭ la revolucio, kaj konsciis la imperiisman minacon. Ili malkaŝe petis la morton de Mirbach kaj ribelon kontraŭ la germana invado. Ili malkaŝe predikis siajn kredojn, sed nek Spiridonova nek ŝiaj kamaradoj havis scion pri ia ajn komploto por uzurpi la potencon.

La Ĉoko aktiviĝas

Post la morto de Mirbach, Spiridonova mem venis al la kunsido de la kvina Tutrusa Kongreso cele legi la oficialan deklaron de ŝia partio, kiu rakontis la bezonon kaj pravigon por la morto de Mirbach. Ŝi kaj ŝiaj kamaradoj estis pretaj suferi la konsekvencojn de sia ago. La bolŝevikoj malhelpis la legadon de tiu dokumento fermante la kvinan kongreson kaj arestante la tutan reprezentantaron de la kamparanoj, kun Maria Spiridonova ĉekape. En Septembro 1920, la Ĉoko denove pruvis siajn heroaĵojn per unu el siaj sturmoj kaj la malkovro de komplotoj. En ĉi tiu sturmo okazinta en Moskvo, la kaŝejo de Maria Spiridonova estis hazarde malkovrita. Ŝi estis malsana je tifo kaj ne povis translokiĝi. La domo estis ĉirkaŭita de gvardianoj kaj oni permesis neniun ŝin viziti. Kiam la sankrizo pasis, ili ŝin kondukis al *Ossoby*

Otdell (ejo de la sekreta polico) kaj ŝin metis en la malliberejan hospitalon. Ŝia sanstato estis tiel grava, ke ili fine permesis, ke malnova amikino de Siberio ŝin flegis, kaj ili tenis ambaŭ en kompleta enfermiteco sen tio, ke ili povis sin komuniki eksteren. En Junio 1921 oni ricevis leteron el la malliberejo, en kiu ŝi priskribis sian mizeran vivon: la konstanta gardo de la "kamaradoj", la ĉoko-anoj, la soleca enfermiteco, la senigo de mensa kaj fizika nutrado, iom post iom atingis kion la torturo de la caro ne povis; skorbuto kaptis ŝin, ŝiaj kruroj ŝvelis, ŝiaj haroj kaj dentoj falis, kaj krome ŝi estis kaptita de la halucino pri tio, ke ŝi estis persekutata de la ĝendarmoj de la caro kaj la ĉoko-anoj de Lenino.

Unufoje ŝi klopodis por sin lasi malsatmorti. La Ĉoko ŝin minacis nutri per forto, sed fine ŝi akceptis la proponon de du intimaj amikoj ŝiaj, ankaŭ malliberuloj, kaj al ili permesis ŝin konvinki por ke ŝi manĝu.

Dum la du kongresoj okazintaj en Moskvo, en Julio 1921, la kamaradoj de Spiridonova cirkulis manifeston, kiun ili sendis al la Komunista Centra Komitato kaj la ĉefaj reprezentantoj de la registaro, sciigante al ili la mizeran situacion de Maria Spiridonova kaj petante ŝian liberigon cele havigi al ŝi taŭgan kuracistan servon. Elstara eksterlandano, delegitino al la Tria Kongreso de la Komunista Internacio, laŭdire intervidiĝis kun Trockij, kiu deklaris, ke Spiridonova ankoraŭ estis tro danĝera por ŝin liberigi. Estis tiam, post la apero en la eŭropa socialista gazetaro de la raportoj pri ŝia sanstato, kiam ŝi estis liberigita kondiĉe, ke ŝi revenos al malliberejo tuj kiam ŝi reakiros sian sanon. La amikoj, kiuj ŝin flegas, nun troviĝas antaŭ la alternativo ŝin lasi morti, aŭ permesi, ke ili ŝin revenigos en la malliberejon. Ekzistas nur unu maniero per kiu ŝi povus esti savita, ke ŝi havus okazon forlasi Rusujon. Ŝiaj amikoj petis pri ĉi tiu afero la bolŝevikan registaron, sed ĝis nun ĉio estis vane. En 1906, la protestoj de la civilizita mondo estis tio sola, kio savis Maria-on,

kaj estas vere tragike, ke simila protesto necesas por ŝin savi nuntempe. Ekster la gvatado de la Ĉoko, for de la katastrofoj de Rusujo, en la montaro, kie la aero kuras libera, Maria Spiridonova povus reakiri sian sanon. Ŝi jam suferis cent mortojn. Ĉu oni permesos ŝin reveni en la vivon?

10-a ARTIKOLO: LA LERNEJOJ DE LA "MORALAJ DIFEKTOHAVULOJ" NE ESTAS PLI BONAJ OL LA MALLIBEREJOJ MEM

Mi nur vidis unu infanon rideti.

La laŭgrada neniigo de la infanoj fare de la malsato, kiun mi iom post iom eksciis, estis la ĝenerala metodo uzata en la nomataj infanaj korektejoj. Komence mi dubis pri tio, sed la pruvoj estis tiel evidentaj, ke mi fine devis min konvinki pri la faktoj. En la Hotelo *Astoria*, "Unua Domo de la Sovetoj", en la ĉambro apuda al la mia loĝis virineto kun ŝiaj du infanoj. Ŝi estis komunistino, kaj tamen ŝi forte batalis kontraŭ la metodo de la korektejo; ŝi laboris en pluraj infanaj institucioj kaj ne nur konfirmis la tre malbonan kondiĉon, kiun mi konstatis en la lernejo "*Kronversky Prospect*", sed ke ŝi kondukis min al aliaj, kie tiaj metodoj trudiĝis.

Mia najbarino rakontis al mi tion okazintan al ŝiaj propraj infanoj, trijaraĝa knabo kaj naŭjaraĝa knabino. Ambaŭ estis metitaj en infanan restadejon, kien la patrino sendis al ili provizaĵojn pro la malmulto, kion ili ricevis tie. Post ses monatoj la geknaboj malsaniĝis kaj endis revenigi ilin al la malgranda ĉambro, kie ŝi loĝis. La knabino estis atakita de maligna erupcio kaj la knabo preskaŭ konsumiĝis. Ambaŭ kazoj estis diagnozitaj, kiel kaŭzitaj de malbona nutrado.

Mi amikiĝis kun mia najbarino, kaj per ŝi mi eksciis la ĝeneralan rangon de la infanoj, kaj povis klare konstati, ke la bolŝevikoj klopodis por fari ĉion, kion ili povis, favore de la infanoj, sed iliaj penadoj estis venkitaj de la parazita burokrataro, kiun ilia ŝtato kreis. Ĉefe mi konstatis ilian detruan ideon pri tio, ke eĉ la infanoj devas esti uzataj por propagando. La "demonstracia" lernejo kaŭzis diablan influon precipe sur infanojn. Ĝi koruptis la mensojn de la knaboj per sento

de maljusteco kaj diskriminacio. Kaj dum ĉi tiuj "demonstraciaj" lernejoj estis uzataj kiel propagando eksterlande, la amasoj da infanoj en Rusujo estis forlasitaj, same kiel ĉiuj infanoj de laboristoj en la resto de la mondo. La privilegiuloj ricevas ĉiujn avantaĝojn kie ajn ili estas, kaj ĉi tio ankaŭ okazas en Rusujo.

Mi komence diris, ke mi maltrankviliĝis, kiam mi unuafoje eksciis, ke oni izolis infanojn, kiel "ŝtelistojn kaj moralajn difektohavulojn", kaj mi kredis, ke ĉi tiu konduto estis kaŭzita de la malmoderna ideo de la kuracistoj respondecaj de la hotelo de *l'Europe*, sed artikolo en la oficiala *Pravda* kaj pluraj konversacioj, kiujn mi tenis kun eminentaj komunistoj inter ili Maksim Gorkij, s-ino Lilina kaj aliaj konvinkis min, ke ili ĉiuj kredis je la "mempropra morala perversio."

Eĉ kelkaj eminentaj pedagogoj konsilis la malliberejon por "la moralaj difektohavuloj", sed tio estis multe por Lunacharsky, Komisaró pri Instruado, Gorkij kaj aliaj el la plej progresema ularo, kiujn la fanatikaj bolŝevikoj priskribis kiel sentimentalulojn. Lunacharsky luktis kontraŭ la barbara propono kaj bonŝance sukcesis, sed tamen, en Septembro 1921, ankoraŭ estis 200 junuloj, inter ili okjaraĝa knabo, en la malliberejo *Taganka* en Moskvo.

Mi certas, ke nek Lunacharsky nek Gorkij eksciis tion, kaj tie kuŝas la malbeno de la infera rondo, kiu nebligas, ke la estroj ekscias kion faras iliaj subuloj. La infanoj en la malliberejo de *Taganka* estis malkovritaj de la politikaj malliberuloj senditaj al tiu malliberejo; ĉi tiuj denunciis la fakton al siaj amikoj en libereco, kiuj sciigis Lunacharsky-on kaj, fine ili estis liberigitaj.

Tamen la lernejoj kaj restadejoj por la difektohavuloj ne estas pli bonaj ol la malliberejoj. Enketo efektivigita de la komunista junularo malkovris teruregajn aferojn en kelkaj el ĉi tiuj lernejoj en Petrogrado. La raporto estis publikigita en

Pravda de Petrogrado, en Majo 1920, kaj konfirmis la ofte faritajn akuzojn, inkluzive tiun de la korektejo kaj la pliigon de gardistoj koste de la porciumoj de la infanoj kaj aliajn metodojn de korupteco kaj senkompetenteco. Ekzemple la komitato malkovris, ke en lernejo el 125 knaboj estis 138 gardistoj, en alia el 25 knaboj estis 38 gardistoj, kaj ĉi tiuj ne estis esceptaj kazoj. Krome la raporto del komitato diris, ke la knaboj estas tute forlasitaj, vestitaj per malpuraj ĉifonoj, dormis ene de la rubaĵoj kaj, ke la malbonodoraj litoj ne havis blankajn litotukojn; ke oni punis multajn el la infanoj enfermante ilin en mallumaj ĉambroj dum la nokto, aliaj estis punitaj sen vespermanĝo, kaj kelkaj estis mistraktitaj. Ĉi tiu raporto kaŭzis grandan konfuzon inter la oficialaj rondoj.

Speciala enketo fariĝis pro ĉi tiu afero, kaj kompreneble okazis kiel en Usono, ke ĉio estis kaŝita; oni admonis la komitaton de la komunista junularo kaj al ĝi diris, ke ĝi "trois", ke tia artikolo ne devis esti publikigita kaj, ke ĝi estis propagando de la kontraŭrevoluciuloj, ktp.

Mi diskutis la aferon kun kelkaj komunistoj, kaj miris pri tio, ke tiaj aferoj okazas en la komunista Rusujo, kaj mi ricevis la kutiman respondon: «manko de fideblaj kaj efikaj laboristoj». Mi min proponis por labori inter la "moralaj difektohavuloj", kaj ili konsilis al mi intervidiĝi kun la «k-dino Lilina, kiu ĝuos akceptante vin». Tagojn poste mi ricevis viziton de k-dino Lilina, malforta virino kun malmolaj trajtoj, la tipa instruistino de la lernejoj de Nov-Anglujo antaŭ kvindek jaroj, kiu certigis al mi, ke ŝi tute familiariĝis kun la plej bonaj metodoj de pedagogio kaj fiziologio, kaj mi kuraĝis diri al ŝi, ke mi ne konsentis kun la malmodernaj teorioj pri la perversa moralo de la infanoj kaj, ke ekzistis neniu moderna edukisto kredanta je ili; ke la moralaj difektohavaj infanoj ne estu konsiderataj nek karakterizataj kiel degeneratoj. Mi parolis al ŝi pri la modernaj metodoj kaj eksperimentoj faritaj en Usono de la juĝisto Lindsey kaj aliaj, kiuj malakceptis la mo-

ralisman koncepton pri la pekulo kaj la sanktulo. «Ha, jes, ĉio ĉi tre taŭgas en kapitalista lando, kie abundas la manĝaĵoj kaj ceteraj necesaĵoj por la vivo, sed en la malsata Rusujo, "la moralaj difektohavuloj" estas la neevitebla rezulto de longa milito kaj necesas preni antaŭzorgojn».

Dum mia kvarmonata vojaĝo en Ukrainujo, mi havis multajn okazojn neoficiale viziti infanĝardenojn, internajn lernejojn kaj restadejojn; kompreneble ĉie mi renkontis la saman kondiĉon: "demonstracia" lernejo-modelo kun bone nutritaj kaj zorgataj infanoj, dum en la ceteraj institucioj la infanoj malsatis. Multfoje mi konstatis, ke la viroj kaj virinoj vigle luktis kontraŭ la burokrata maŝino kaj sincere defendis la interesojn de la infanoj; sed ĉio vane, ĉar ili estis finfine forigitaj de la potenca maŝino.

Mi vidis klaran ilustraĵon de ĉi tiu fazo en Moskvo, nelonge antaŭ mia foriro. En certa distrikto ekzistas "*creche*" (lernejo), la plej bone ekipita kaj organizita, kiun mi konis en la tuta Rusujo. La Matrono estis malofta virina tipo, idealistino, edukistino de ampleksa sperto, kaj senlaca laboristino. Ŝi forte kontraŭstaris la korektejon. Ŝi ne ŝtelis Petron por ke manĝu Johano, ŝi ne klopodis por subaĉeti la malgravajn oficialulojn de la subfako. Kiel kutime oni starigis kampanjon kontraŭ ŝi, kaj la kampanjestro estis la kuracisto mem de la institucio, komunisto. Ŝi estis akuzita pri ĉio neesprimebla, kaj neniu el la akuzoj havis ian bazon. Sed la maŝinaro ne haltis ĝis la virino estis elpelita, kio cetere signifas perdi la loĝejon. Ĉi tiu virino havis kvarmonatan filon. Ĉi tio okazis dum la monato de Novembro kaj la vetero estis tro malvarma kaj malseka, kaj tamen virino, kiu luktis por la "*creche*", estis forpelita el ĝi; ŝi rifuzis foriri ĝis oni al ŝi certigis ĉambron por ŝia filo, tiam ŝi ricevis malgrandan, malsekan kaj malluman ĉambron en la subtera etaĝo de la konstruaĵo. En tiu tombo, la knabo malsaniĝis kaj daŭre malsanas de tiam. Ĉu konas Lunacharsky ĉi tiujn aferojn? Sendube li konas

kelkajn, sed li estas tro okupata de "gravaj aferoj de la ŝtato" kaj ne povas trakti tiajn "bagatelojn". Dum miaj du jaroj en Rusujo mi vizitis multajn instituciojn kaj renkontis tre malmultajn feliĉajn infanojn. Dum la tuta tempo mi ne vidis pli ol unu rideton de feliĉo en Arĥangelsko. Aliokaze mi povos skribi pri ĉi tiu infano, sed ĝenerale la infanoj de la bolŝevikaj institucioj al mi faris la impreson de senkoloraj kaj stereotipaj, kiel veraj infanoj de aziloj por orfoj.

Enhavtabelo

ENKONDUKO DE LA TRADUKINTO.....	3
AL LA KAMARADOJ.....	4
KIEL ENKONDUKO.....	6
1-a ARTIKOLO.....	18
2-a ARTIKOLO.....	24
3-a ARTIKOLO: DEVIGA KOLEKTADO.....	30
4-a ARTIKOLO: LA ĈOKO.....	36
5-a ARTIKOLO: MEMOROJ PRI KROPOTKIN.....	40
6-a ARTIKOLO: LASTA INTERVIDIĜO KUN KROPOTKIN	46
7-a ARTIKOLO: LA SINDIKATOJ.....	52
8-a ARTIKOLO: DEVIGA LABORO.....	60
9-a ARTIKOLO: LA PERSEKUTO DE MARIA SPIRIDONOVA.....	64
10-a ARTIKOLO: LA LERNEJOJ DE LA "MORALAJ DIFEKTOHAVULOJ" NE ESTAS PLI BONAJ OL LA MALLIBEREJOJ MEM.....	72

Organiziĝu

Kleriĝu

**Biblioteko
Mateo Morral**

Aggu

www.bmmorral.org
info@bmmorral.org